

Etnismo

N-ro 104

INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ

31.12.2019



Okcitanio: kio ĝi estas? p. 4-9

La lingvo-ilaro *Apertium*

kaj minoritataj lingvoj, p. 12-15

Ktp ...

EN TIU ĈI NUMERO:

- Eldonista letero, p. 3.
- Okcitanio: kio ĝi estas? p. 4-9.
- Udmurtio: li fajrigis sin por protesti kontraŭ la lingvomortiga politiko de Rusio, p. 10-11.
- La lingvo-ilaro *Apertium* kaj minoritataj lingvoj, p. 12-15.
- La beninaj lingvoj kaj dialektoj, p. 15-16.
- Kimra kulturfesto plu, p. 17.
- «Kostas denunci la malobservon de la lingvaj rajtoj», p. 18.
- Jam komencis labori la redakcio de la ĵurnalo «Nós Diario», p. 19.
- «Ni volas, ke la skotgaela estu alloga por la junularo» p. 20.
- Konkize el ..., p. 21 – 22.
- La lernejoj de la rapanuia, p. 22-23.
- «Ni severe trudis paroli nur rapanuie» P. 24

FOTO SUR LA KOVRILPAĜO: Manifestacio en Béziers, 20.03.2007. El Vikimedio.

Informilo pri etnaj problemoj

La membroj de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) ricevas *Etnismo*-n sen krompago, normale 2 kalendarojn de minimume 36 paĝoj. Unuopa ekzemplero (de simpla numero kosta 5 €). La artikoloj publicitaj en *Etnismo* ne nepre esprimas starpunkton de IKEL, se ili ne estas subskribitaj ĝianome. Ĉiuj eroj de la «IKEL-*Informilo*» estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honorarion. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti kontribuojn.

ESTRARO:

PREZIDANTO: *Alain FAVRE* (savoĵano),
Damo de Vi, allée du Quart d'Amo 171,
FR-74140 Chens-sur-Léman, tel: ++33682093845,
retadreso: afavre1@hotmail.com;

VICPREZIDANTO KAJ REDAKTISTO:

Nicole MARGOT (vaŭdanino),
ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne
tel: ++ 41 21 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch

SEKRETARIO: *Nikolas XIL CARVALHO* (asturleonio),
48 postakutxa. 20400 Tolosa. Gipuzkoa. Eŭskio/EH
tel: ++ 34 630 44 68 63,

retadreso: fokomelo.makolji@gmail.com

KASISTO: *Xabier RICO ITURRIOTZ* (eŭsko),
Manuel Iradier, 22-1-ezk. ES-01005 Gasteiz
Euskal Herria-Eŭskio

retadreso: xabirico@outlook.com

RILATOJ KUN ESPERANTO-GAZETOJ. REVIZIADO:

István ERTL (hungaro), 22, rue Faulfiels
LU-7355 Helmdange, Luksemburgio,
tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com

ESTRARANO:

Hèctor ALÒS I FONT (kataluno), Mir pr. 15-55, RU-428024
Shupashkar, Ĉuvaŝio, Rusia Federacio
retadreso: h.alos@esperanto.cat

RETEJO: www.etnismo.org

FORUMO: etnismo@googlegroups.com

KOTIZOJ KAJ KONTOJ:

Kotizoj	eŭroj
Normala	20.00
Subtenanta	30.00
Rabatita	10.00

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks)socialisma aŭ "tria-monda" lando, aŭ estas studento aŭ emerito.

Bonvolu ĝiri vian IKEL-kotizon ekskluzive al la konto de IKEL ĉe UEA (kodo: *ikel-y*), UNIVERSALA ESPERANTO- (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam). Vi povas ankaŭ sendi retmesaĝon al tiu ĉi adreso:

financoj@co.uea.org por pagi rekte el via UEA-konto.

Aliaj pageblecoj:

- BELGA poŝtgironto (pĝk) n-ro **000-1631831-97**
- GERMANA (Köln) pĝk n-ro **318291- 509**
BLZ 370 10050 IBAN:
DE51370100500318291509SWIFT PBNKDEFF
- NEDERLANDA pĝk n-ro **37 89 64** IBAN:
NL24PSTB0000378964, SWIFT PSTBNL21
- SVEDA pĝk n-ro **74374-0**
IBAN: SE9595000099604200743740,
SWIFT NDEASESS
- SVISA pĝk **12-2310-0** (Bulle)

Ĉiukaze indiku «*ikel-y*» kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certiĝi, ke via kompleta kotizo alvenu al la IKEL-konto: IKEL absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkostojn!

Perantoj:

- FRANCIO eblas sendi ĉekojn al *Alain Favre*. (Poŝtadreso ĉi-supre.)
- NORVEGIO <oficejo@esperanto.no>.
- KATALUNIO Víctor Solé v.sole@esperanto.cat

Eblas reklami en *Etnismo*! Anonctarifo: (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6 p. 15.

Rabato por IKEL-membroj: 10 %.

Venonta redaktolimdato:
30-a de aprilo 2020

ELDONISTA LETERO

Post la kataklismo...

Antaŭ larĝa trideko da jaroj aperis la lasta romano de franca verkisto politike tute ne ĝusta, kiu kunlaboris kun nazioj dum la dua mondmilito kaj poste kapablis subteni ankaŭ agadojn de (ekstrem)maldekstruloj. La titolo de tiu romano estas “La Blankmonta Respubliko” (1). Temo: en la regiono de Blanka Monto, en la Alpoj, homoj ne plu eltenas dekadencan, monavidan socion kaj sukcesas fondi respublikon super la 3000-metra altlinio. Malgraŭ apartaj malfacilaĵoj ili sukcesas konstrui novan civilizon, uzante savojan dialekton de la arpitana (proksimume la mian!) kaj apenaŭ plu komunikante kun la loĝantoj de la valoj. Des pli, ke malalte okazas nur tumultoj, geriloj, alvenoj de homoj, kiuj forlasis la proprajn regionojn por trovi kaj partopreni novan kaoson. Amuze en tiu babelo unu el la ĉefaj lingvoj estas Esperanto – kiun mi ne konis en tiu epoko –: tute certe simbolo, por la aŭtoro, de senanima kosmopolitismo. Post almenaŭ unu generacio okazas granda klimata kataklismo, iaspeca neĝa diluvo, la valaj kaj ebenaj homoj malaperas kaj la kelkaj travivintaj blankmontanoj povas reokupi sian devenan teritorion.

Kiel savoja junulo kulture kaj politike jam tre aktiva, mi ŝatis tiun romanon, malfacile troveblan, preskaŭ cenzuritan, kaj aldone bone verkitan. Temis pri ignorata malplimulto, fakte la mia, kaj ŝajnis esti iom da vero en tiu rakonto. Eĉ en la biologia kampo, supervivo de specio sed ankaŭ alveno de novaĵoj okazas tra flankaj, malmultnombraj populacioj, kiuj vivas en tre apartaj kondiĉoj kaj pli facile rezistas al grandaj ŝanĝiĝoj. Kio entute necesigas diversecon, eĉ buntecon, kulturen aŭ biologian.

Kelkajn jardekojn post tiu rakonto la planeda, almenaŭ biosfera situacio tiom malboniĝis, ke oni vere ne scias, kie homoj kaj entute plej multaj vivuloj povus eskapi klimatajn kataklimojn. Plej logike, la homaro devus kunlabori kaj trovi solvojn por eviti la katastrofon. Sed la konferenco COP 25 ĵus organizita tiucele en Madrido finiĝis per kompleta fiasko. Ĵurnalistoj parolis pri “egoismoj” de la ŝtatoj, la ĝenerala sekretario de UN mem povis nur “bedaŭri” la malsukceson.

La ŝtatoj ne nur rifuzis agi, sed plej multe kulturen buntecon ili same rifuzas; naciismo prosperas pli ol iam ajn dum la lastaj jardekoj, “popolismoj” kaptis la povon en plej influaj landoj kaj prifajfas la biosferajn minacojn. Ili firme ligiĝas al grandaj ekspluatitaj kompanioj, estas do “monaferoj kiel kutime” (*business as usual*), kun detruoj de vivmedioj, de tropika praarbaro ĝis tundro, kaj malaperigo – foje fizika! – de la lokaj etnoj.

Oni eble batalos por elsuĉi la lastan guton de nafto, faligi la lastan arbon, kapti la lastan fiŝon. Iaspeca mortoprocezo ekis kaj ŝajnas nehaltebla. Pli ol plenkreskuloj kaj olduloj, junuloj prave emas reagi, sed ilia *pasionaria* estas ofte konsiderata malsanulino, eĉ frenezulino, iaspeca monstro. Kompreneble la altaj politikaj respondeculoj, male, estas mense perfekte sanaj. Ĉefe kiam ili neas la klimatajn minacojn, subtenas militkrimulojn, celas kreadon de terure efikaj armiloj, malpermesas ĉion “kontraŭan” al la nacia kulturo, diskriminacias parton de la loĝantaro. Pri tiuj lastaj aspektoj vi cetere povos abunde legi en la venontaj paĝoj.

Kion fari, kiam niaj gvidantoj, niaj naciŝtatoj – jam respondecaj pri tiom da dramoj kaj detruoj en la pasinta jarcento – pli malpli rezignis pri efika kunagado? Ĉu ni konstruu alternativojn, kiuj eskapu la ŝtatajn kontrolojn? Ĉu ni kreu niajn proprajn etajn “respublikojn”, kun mallongdistancaj interŝanĝoj por pli bone rezisti venontajn krizojn, provante fabriki ĉion vere necesan surloke? Ĉu ni uzu aliajn valutojn, aliajn eduksistemojn, en aliaj lingvoj kaj instruante aliajn valorojn?

Iuj jam de sufiĉe longe pensas pri tio. Ankaŭ vi eble havas ideojn, jam konkrete faris interesajn paŝojn en tiu direkto. Ne hezitu sciigi nian redakcion pri viaj agoj, spertoj kaj ideoj.

Antaŭ la kataklismo, preferinde.

Kun (tamen) plej bonaj deziroj por la nuna jaro, plu kalkulante je via renovigita subteno.

(1) SAINT-LOUP, *La République du Mont-Blanc*, eldonis *La Table Ronde*, 1982.

Alain Favre

Okcitanio: kio ĝi estas?

Okcitanio estas lando, kiu definiĝas per sia lingvo. Ĝi situas en la sudo de la franca ŝtato, limiĝas okcidente per Atlantiko, sude per la Pireneoj (oni devas elpreni Eŭskion kaj nordan Katalunion, sed aldoni la valon de Aran) kaj Mediteraneo, oriente per Alpoj (oni devas aldoni sep valojn en la itala ŝtato). La norda limo estas pli malfacile priskribbla.



Esperantigita mapo el blanka mapo de Vikipedio. Aŭtoro de la blanka mapo: *Norin strange*, 2007.

Situo de Okcitanio.

Okcitana lingvo – Historia skizo

En la sudo de la nuntempa franca ŝtato vivis Keltoj. Poste, dum la 2-a jarcento antaŭ J. K., alvenis Romianoj. De miksaĵo inter ilia lingvo (la latina) kaj la lokaj lingvoj naskiĝis la okcitana lingvo. Oficiale, la unua teksto de la okcitana lingvo aperis ĉirkaŭ la jaro 1000. Intertempe la lando estis regata de Vizigotoj, kiuj alportis la arton verki leĝojn. Ilia leĝaro estis tiutempe pli favora al la virinoj ol en aliaj eŭropaj regionoj.

Inter la jaroj 1000 kaj 1200 estis ora periodo de la lingvo. La poetoj, nome Trobadoroj, kreis tutan filozofion bazitan sur ŝlosil-vortoj kiel “*Paratge*” (Disdono), “*Conviviença*” (Kunvivo), “*Gai saber*” (Gaja scio) kaj ĉefe “*Amor*” (Amo), kiu temis pri samnivela amo inter viro kaj virino (nova koncepto en tiu periodo). La franca lingvo prunteprenis la vorton.

En tiu periodo Tuluzo estis la kvina urbo laŭ grandeco en Eŭropo. La grafo *Rajmund* (kaj liaj filoj) regis sur tre riĉa graflando, kiu komercis kun araboj de


la tiama Hispanio kaj la alia flanko de Mediteraneo. Religia toleremo regis, araboj kaj judoj de Hispanio venis instrui filozofion kaj matematikon en la unua medicina universitato de la lando: *Montpelhièr*. Pro tiu toleremo alvenis Kataroj, anoj de nova religio, kiu venis de Orienta Eŭropo (de Bulgario, kaj estis oficiala iam en Bosnio).

La papo el Romo petis la reĝon de Francio ĉesigi la

praktikon de katara religio. Por la reĝo, tio estis bona kialo invadi kaj ŝteli landojn riĉajn kun malfermo al la suda maro. La krucmilito daŭris pli ol 50 jarojn kaj estis tre kruela. Estis la unua fojo kiam kristanoj mortigis kristanojn. La francoj mortigis ĉiujn loĝantojn de la urbo *Besièrs*. La francoj venkis kaj la lastaj Kataroj restis en la *Montsegur*-a kastelo. Poste oni ilin forbruligis ĉar ili ne volis ŝanĝi religion. Post tiu milito Okcitanio iĝis parto de la reĝlando de Francio.

La okcitana literaturo tamen pluis. La plej ĉefa poeto de tiu periodo

estas *Pèire Godolin*, tuluzano.



Ramelet Moundi, Tuluzano bukedo (1), estas la ĉefverko de la tuluzano verkisto (1580-1649) *Pèire Godolin*.

El Vikimedio: titolpaĝo de la unua eldono (1647)
Aŭtoro:



Esperantigita mapo el Vikimedia. Aŭtoro de la baza mapo: Aatus.

Ĉefaj lingvaj regionoj en Okcitanio.

Poste alvenis la franca revolucio. En tiu momento kelkaj revolucianoj volis formortigi la lingvojn aliajn ol la francan. Tiu politiko akriĝis ankoraŭ pli dum la tria respubliko (1870-1914), kiam oni batis la infanojn en la lernejoj, se ili parolis alian lingvon ol la francan. Malgraŭ tio alvenis renasko de la lingvo dank'al la movado de *Felibres*, asocio de poetoj ĉefe de Provenco. La plej konata, *Frederic Mistral*, ricevis en 1904 la Nobelan premion de literaturo.

Ekde tiu periodo, nenio nova. La franca politiko daŭre ne agnoskis lokajn lingvojn. Francio subskribis la Eŭropan Ĉarton pri la Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj, sed ĝin ne ratifis la parlamento. La lingvo tamen supervivas kaj havas preskaŭ 3 milionojn da parolantoj. Ĝi ekzistas per rezisto, gazetoj, radioj, retpaĝoj, festivaloj, muzikgrupoj, teatraĵoj, ktp...

Geografiaj regionoj

La okcitana lando estas dividita en 6 ĉefajn dialektejojn: 3 norde kaj 3 sude. La sudokcidenta estas *Gasconha* (Gaskonio), la sudcentra *Lengadòc* (Langvedoko), kaj la sudorienta estas *Provença* (Provenco). Nordokcidente troviĝas *Lemosin* (Limoĝio), nordocentre *Auvèrnhe* (Aŭvernjo) kaj nordoriente la lingva regiono de *vivaropenc* (vivaralpa dialekto), kiu enhavas partojn de la regionoj *Velai* (Velajo), *Vivarès* (Vivario) kaj *Daufinat* (Daŭfenlando).

Nacia kulturo

Pro tio, ke la lando estis neniam unuiĝinta kaj sufiĉe vasta, ankaŭ la kulturo diversas. Tamen gravas: manĝaĵo, ekzistas multe da diversaj

pladoj (grasa hepato). Ludoj: rugbeo, petanko (buloj), boataj turniroj kun lancoj en la urbo Seto, kegloj, tamburino kun pilko. Ankaŭ kanzonoj estas grava tradicio, oni kuniĝas nur por kanti (*cantèras*) en publikaj lokoj. Karnavaloj gravas: en *Limós*, ĝi estas la plej longa de la mondo (3 monatoj) kaj oni renkontas tie du specojn de figuroj: *fècas* e *godils*. Ekzistas ankaŭ la personeco de *Petaçon*, pra-Arlekeno ligata al la kreskado de la kanaba planto en Provenco.

La nomo de la lingvo

La nomo oficiala de la lingvo estas *occitan*, sed oni povas renkonti ankaŭ aliajn esprimojn kiel ekzemple *lenga d'òc*, laŭvorte "lingvo de jes" aŭ

lenga nòstra, laŭvorte "nia lingvo". Fojfoje oni uzas ankaŭ la nomon de varianto kiel *gascon*, *auvernhat*, aŭ eĉ de pli loka varianto kiel *bearnès* aŭ nomon de la koncerna valo: *aranès* en Valo Aran aŭ eĉ de urbo: *lenga mondina*, kiu signifas "tuluza lingvo", ĉar *mondin* venas de la nomo de grafoj de Tuluzo, *Ramon* (1).

Dum la mezepoka periodo la fameco de la Trobadoroj, kiuj verkis ĉefe en la limoĝia varianto, kaŭzis ke oni nomis la lingvon *lemosin*, limoĝa.

Dum la 15a jarcento, la prestiĝo de la kadetoj (Vidu suban kadron) de Gaskonio kaŭzis, ke oni nomadis la lingvon *gascon* gaskona.

Post la ricevo de la Nobela premio de *Frederic Mistral* en 1904, oni ofte menciis la lingvon kiel *provençau* provenca.


La nekutima vojaĝo de la gaskona vorto "capdèth"

La vorto "*capdèth*" signifas je la komenco "juna hundo" kaj ankaŭ la plej juna infano de la familio. Laŭ la malnova vizigota leĝaro, en Okcitanio, virino povis heredi kaj ricevi la bienon aŭ la teron, se ŝi estis la unue naskita. Pro tio multe da plimalfrue naskitaj infanoj, viroj, soldatiĝis. Oni do kreis regimentojn de "*capdèths*". Ili famiĝis sur batalkampoj pro granda kuraĝo kaj batalemo.

Kiam Henri IV-a (kiu venis de Bearn, parto de Gaskonio) iĝis reĝo de Francio, li kunportis tiujn regimentojn de "kadetoj". Tiam la vorto anstataŭis la francan vorton "*puîné*", kiu ankoraŭ troviĝas en juraj tekstoj. Oni samtempe timis ilin kaj ricevis ilin en prestiĝaj nobelaj salonoj, kie oni tie ŝatis ilian parolmanieron, sed tamen mokis ilian krudecon. La romano "*Cyrano de Bergerac*" bone spegulas tiun epokon.

La francigita vorto "*cadet*" iĝis poste internacia kiel "juna soldato" aŭ "juna oficiro". Oni trovas ĝin eĉ en la japana. En la angla lingvo ĝi iĝis "*caddy*" kiel "juna soldata helpanto", poste "portisto de golfklaboj" kaj estas nun uzita por ĉaretoj en supermerkatoj. La nuntempaj gaskonoj ne scias, ke dum aĉetado ili uzas malnovegan historian gaskonan vorton.

JoMo



El Vikimedia. Fonto: gallica.bnf.fr, *Lou gentilome gascon* 1610. Titolpaĝo de "*Lou gentilome gascon*" de Guilhem Ader (1610).

La diverseco de la okcitana lingvo

Pro tio, ke la okcitana lingvo neniam estis oficiala lingvo de unuigita ŝtato, ĝi vivas en "natura stato" kiel ĉiuj naturaj lingvoj, kiuj ne estis unuigitaj per akademio. Ĝi do havas multajn variantojn. Ofte oni povas renkonti homojn, kiuj diras, ke «de unu vilaĝo al la najbara oni ne komprenas unu la alian», sed tio estas tute nevera. Kompreneble ekzistas diferencoj en vortaro aŭ en gramatiko, kiel en ĉiuj lingvoj en natura stato, sed interkompreno eblas, ĉefe ene de unu dialekto.

Mia avo venis de Gaskonio al Tuluzo por armea servo. Li diris al mi, ke li rimarkis diferencojn en la vortprovizo, sed neniam aludis nekomprenon. Tiurilate li memoras nur ke "la hundo" ili diris surloke *le gos* (vorto tre proksima al la kataluna *el gos*) kiam li diris *lo can*. Notu la tipan tuluzan artikolon *le* anstataŭ la tutokcitana *lo*.

Kutime mi neniam uzas la vorton "dialekto" (france *patois*), ĉar fojfoje ĝi estas miskomprenata kiel

"sublingvo", do "lingvaĉo" aŭ "senkultura parolmaniero". Mi opinias, ke pri la okcitana lingvo la uzo de tiu vorto estas klara kaj senambigua. Fakte la vorto "dialekto" devas ĉiam esti sekvata de "de ...", se ne, miskompreno minacas.

Kelkaj vortoj tamen devas esti dediĉitaj al la provenca varianto. Tre prestiĝa komence de la 20a jarcento kiel ni vidis, ĝi estas ofte literumata per la skribmaniero de la fama *Mistral*, kiu estas bazita sur franca prononcmanniero anstataŭ la klasika skribmaniero, tre majoritata en Okcitanio, logike legebla... (Vidu kadron p.7.) Tio kaŭzas tre viglajn debatojn inter parolantoj de la lingvo: la subtenantoj de aparta provenca mistrala skribmaniero ĝenerale rifuzis unuigon de la okcitana lingvo. Tiu kverelo nuntempe ekmalaperas. En la regiono *Bearn* okazis la sama movado kontraŭokcitana, kiu predikis apartiĝon de la bearna lingvo. Sed kiel inter esperantistoj, la lingvaj problemoj estas foje tiklaj, ĉu ne?

La langvedoka

Ĝenerale, kiam oni lernas la okcitanan, oni lernas la langvedokan, pro du kialoj:

- Oni diras ke ĝi estas "centra" kaj ke ĝia scio ebligas komprenon de ĉiuj aliaj variantoj. Fakte tio estas pli malpli vera, sed ĝi estas samtempe la plej simpla dialekto.
- Ĝia regiono estas la plej dinamika laŭ la lingva vidpunkto, ĉar ĝi enhavas studentajn urbojn kiel *Tolosa* (Tuluzo), *Montpethièr* (Montpeliero) aŭ *Besièrs* (Bitero).

La specifajoj de la langvedoka estas:

- Oni prononcas la finan **t**: *cantat* kantata.
- Oni ne prononcas la finan **n**: *occitan* okcitana.
- La latinaj sonoj **ca-** kaj **ga-** restas sensanĝaj: *cantar* (kanti).
- La finaĵo **-al** ne ŝanĝiĝas al **-au**: *ostal* domo.
- La literojn **b** kaj **v** oni prononcas same.

La gaskona

En Gaskonio la regiono *Bearn* aŭ *Biarn*, Bearno estas aparte dinamika kun unu efika eldonejo (*Per Noste*). Tre influita de la malnova eŭska lingvo, la gaskona varianto de la okcitana estas sufiĉe facile rekonebla dank'al kelkaj specifajoj. Ne ĉiuj specifajoj estas uzataj en la tuta regiono. La tuluzo gaskona lingvo uzas nur kelkajn. Jen la ĉefaj:

La litero "f" de la latina iĝas "h" en la komenco de vorto. Se konsonanto sekvas, ĝi ne plu estas prononcata: *hemna* (Langvedoka *femna*) virino, *huec* (L *fuòc*) fajro, *har hèr* (L *far*) fari, *harina* (L *farina*) faruno, *hrai* (L *fratre*) frato, *hlor* (L *flor*) floro.

La litero "r" de la latina iĝas "arr" en komenco de vorto: *arriu* (L *ribiera*) rivero, *arren* (L *res*) nenio, *arròda* (L *ròda*) rado, *arrat* (L *rat*) rato, *arroi* (L *roge*) ruĝa.


La literoj “ll” de la latina evoluis al “r” ene de vorto kaj al “th” ĉe la fino (en la langvedoka al “t” ambaŭkaze): *castèth* (L *castèl*) kastelo, *vedèth* (L *vedèl*) bovido, *garia* (L *galina*) kokino, *aperar* (L *apelar*) alvoki.

La litero “n” malaperas ofte inter du vokaloj: *ua* (L *una*) unu, *lua* (L *luna*) luno, *garia* (L *galina*) kokino, *prua* (L *pruna*) pruno.

La litero “i” en fina pozicio, kiel en multaj aliaj okcitanaj variantoj, iĝas “u”: *ostau* (L *ostal*) domo, *mau* (L *mal*) malbone, *que cau* (L *cal*) bezonas.

La litero “r” moviĝas en la vorto al la komenco: *praube* (L *paure*) malfeliĉa, malriĉa, *craba* (L *cabra*) kaprino, *cramba* (L *cambra*) ĉambro.

La grupo de literoj “nd” simpliĝas al “n”: *vèner* (L *vendre*) vendi, *tóner* (L *tondre*) tondi.



El Vikimedio. Aŭtoro: pepe.cornet.

Versoj de *Frédéric Mistral* sur la tombo de la muzikisto *Gounod*.

Oni aldonas la vorteton *que* antaŭ la verbo en aserta frazo. En demanda frazo, estos *e* kaj en ekkria frazo *be*. Tiel la personaj pronomoj estas preskaŭ ĉiam algluitaj al tiu vorteto. *Que soi* (L *soi*) mi estas, *E'm veses?* (L *Me veses?*) Ĉu vi vidas min?, *Be't parlì!* (L *Te parlì!*) Mi parolas al vi!

La provenca

La tre fama provenca verkisto *Frederic Mistral* (1830-1914) ricevis la Nobelan premion de literaturo en la jaro 1904. Li ankaŭ verkis impresan vortaron de la okcitana lingvo konatan sub la nomo *Lou Tresor dóu Felibrige*. En la periodo kiam vivis Mistral, oni skribis la okcitanan lingvon per franca skribmaniero, sistemo nomata nuntempe *grafia mistraleca*, mistrala skribmaniero. Omaĝe al tiu granda poeto multaj provencaj daŭre skribas per tiu sistemo, sed pli kaj pli la *grafia classica*, klasika skribmaniero, ne plu estas taksata kiel perfido al la poeto. La problemo de la mistrala sistemo estas, ke vi devas scipovi la francan skribmanieron por povi legi. En Provenco la konscio pri la lingvo estas ege malforta, sed ekzistas tie tre simbolaj muzikgrupoj kiel *Massilia Sound System*, *Moussu T e lei Jovents* aŭ *Lo còr de la plana*, kiuj kantas en la okcitana kaj havas larĝan aŭskultantaron. La specifajoj de la provenca estas:

La sonoj â, ê, î, ô, ù estas tre nazale prononcitaj, tio estas specifeco de la provenca akcento.

Oni malsame prononcas la “v” kaj la “b”, tutsame kiel en esperanto.

La litero “i” ĉe la fino de vorto iĝas “u”: *mau* (L *mal*) malbone, *sau* (L *sal*) salo.

Tre ofte la lastaj konsonantoj ne estas prononcataj, ankaŭ ne la “s” de la pluralo: *un grand ostau*, *deis grands ostaus* (L *un gran ostal*, *de grans ostals*) unu granda domo, grandaj domoj.

La plurala difinita artikolo estas *lei*, prononcata *li*, kaj la pluralo de la adjektivoj estas *-i*.

En konjugacio la unua persono de la pluralo havas kiel finaĵon *-n* anstataŭ la kutiman *-m*. Pro tio, por ne konfuzi ĝin kun la tria persono plurala, ĝi havas la finaĵon *-on*: *cantan* ni kantas, *canton* ili kantas. Vi povas ankaŭ rimarki la diferencon de akcento.

Vi povas rekonigi la formon de la verbo “esti” en provenca teksto, ĝia konjugacio estas: *sieu sies es sian sias son*.

La preterito havas la saman formon kiel en la langvedoka: *cantèri* mi kantis. La verbo “esti” havas la formojn *fuguère*, *signère* mi estis.

La aŭvernja

La nordo de Okcitanio estas tre kampara kaj eĉ montara. Foje la okcitanparolantoj de tiuj regionoj plendas pri manko de intereso de aliaj samlingvanoj. La aŭvernjan varianton oni povas facile rekonigi dank'al ĝiaj specifajoj:

La sonoj *ca-* kaj *ga-* de la latina iĝis *cha-* kaj *ja-*.

La klasika skribmaniero de la okcitana

Tiu ortografio, kiu estas nun la plej uzata por la okcitana, devenas de la skribmaniero de la famaj mezepokaj *trobadors* (trobadoroj), kio klarigas la epiteton “klasika”. Ĝi estis modernigita en pluraj etapoj, ekde la komenco de la 19a jarcento, kun diversaj influoj – mistrala (tio estas de *Frédéric Mistral*, nobelpremiita provencano), fabraa (de *Pompeu Fabra* i *Poch*, kreanto de normo por la kataluna) kaj aliaj. La *Institut d'Estudis Occitans* (Instituto pri okcitanaj studoj) uzas kaj apogas tiun normon ekde sia fondo en 1945. Post iom da debato ĝi estis oficiale adoptita en Aranvalo, sed ne en la piemonta parto de Okcitanio. Plu ekzistas aliaj normoj, kiel interalie la mistrala skribmaniero, ĉefe uzata en Provenco.

Tiu klasika normo sufiĉe parencas kun tiu de la oficiala kataluna kaj de la ORB-skribmaniero de la arpitana, kio igas tiujn tri latinidajn lingvojn grandparte interlegeblaj, kun minimumaj konoj de la aliaj por parolanto de unu el ili.

AF

Lo jal chanta (la koko kantas) estas tre simbola frazo.

Oni ne prononcas la lastajn konsonantojn: **chantat** (kantata).

Oni aldonas la literon **z** antaŭ vokalo en la komenco de vorto: **z-ai chantat** mi kantis.

La litero **d** inter vokaloj povas malaperi: **chantaa** kantata (ina formo, anstataŭ **chantada** kantata).

La litergrupo **es-** en komenco de vorto iĝas **se-**: **secòla** lernejo, **sepòrt** sporto.

La vivaralpa

Parolata en la nordo de Provenco, en Norditalio kaj en la kalabra (Suditala) urbo **Guardia Piemontese**, tiu varianto de la okcitana estas nomata ankaŭ **lo daufinat** la daŭfenlanda. Ĝi havas kelkajn komunajn punktojn kun la aŭvernja:

La sonoj **ca-** kaj **ga-** de la latina iĝis **cha-** kaj **ja-**. **Lo jal chanta** (la koko kantas) ankaŭ estas tre simbola frazo.

Oni ne prononcas la lastajn konsonantojn: **chantat** (kantata).

La litero **d** inter vokaloj povas malaperi aŭ iĝi **i**: **chantaa**, **chantaia** (kantata), ina formo, anstataŭ **chantada** (kantata).

En konjugacio, la finaĵo de la unua persono estas **o** anstataŭ la ĝenerala **i**. **chanto** (mi kantas).

La litero **l** iĝas ofte **r**: **escòra** (lernejo), **saraa**, **saraia** (salato).

La sintakso

Jen kelkaj specifaĵoj, stilaj aŭ lingvaj, de la okcitana lingvo:

Antaŭ la nomoj de riveroj kaj de landoj oni ne metas la artikolojn **lo**, **la**:

Occitània e Catalonha son amigas.

Okcitanio kaj Katalunio estas amikoj.

Garona es plan longa.

Garono estas tre longa.

Sed la antaŭnomoj bezonas artikolon:

Tè, espia : lo Peiròt se potoneja la Maria!

Nu, rigardu: Peĉjo kisas Marion!

Ni jam vidis, ke oni ne ŝatas la posesivojn. Oni preferas la memajn formojn:

Me prengui lo capèth. Me lavi la veitura.

Mi prenas al mi la ĉapelon. Mi lavas al mi la aŭton.

Tiu formo estas tre uzata, ankaŭ por esprimi, ke oni faras ion kun plezuro:

Me soi crompat una còca e me la soi minjada.

Mi aĉetis kukon kaj mi manĝis ĝin (kun plezuro).

Ne soi hart de tot aquò, me'n vau tornar a l'ostau me hèr un cluc.

Mi estas sata de tio: mi revenos hejmen fari sieston.



Tiu ĉi bildo venas el la surreta Biblioteko Gallica, btv1b60007960.

Manuskripto de trobadoro el Aŭvernjo, **Gauceran de Saint-Leidier**, 13a jc.

Faru mem viajn okcitanajn vortojn!

La okcitana lingvo havas, kiel esperanto, la specifecon ke oni povas krei novajn vortojn dank'al prefiksoj kaj sufiksoj. Ili ne estas tiel multaj kaj precizaj kiel en la internacia lingvo, sed tamen vi povas meti nuancojn en via parolo:

-às, -assa povas esti komparata al esperantaj **-aĉ** aŭ **-eg**, iomete ambaŭ samtempe: **un ostalàs** estas granda domo, **ua hemmassa** estas alta virino kaj pli malpli ne tre bela, **un canhàs** estas granda dika hundo ne tro simpatia.

Male, **-òt, -òta** similas la esperanta **-et** kun korinklina nuanco: **un canhòt** estas hundeto, **ua gojatòta** estas knabineto, **ua plojòta** estas eta pluvo:

-et, -eta havas la saman rolon kiel **-òt, -òta**, plikarakteriza de la langvedoka.

-in, -ina enhavas la saman nuancon de eteco, sed kun nuanco de kompato: **berogin** signifas "bela" sed rompebla, gracia, kaj venas de **beròi**, bela, **lo praubin** signifas, ke li estas povrulo kaj kompatinda.

-ejar kiel la esperanta **-umi**, utilas por krei verbojn: **lo braç**, la brako, donas **bracejar** (brakumi) sed kun la signifo "fari gestojn per la brakoj", **patac** (la bato), donas **pataquejar**, batadi.

-ader similas la esperantan **-ebla** sed ankaŭ **-inda**: **haseder** (farebla), venas de **hèr** fari. **Plorader** plorinda, venas de **plorar** (plori).

-ader, -adèra (ne konfuzu kun la antaŭa) helpas krei nomojn kun iu rilato kun la verbo: **trepader** (trotuaro), venas de **trepas** (treti), **banhadèra** (bankuvo), venas de **banhar** (bani).

-ador, -aire estas la esperanta **-anto** aŭ **-isto**: **jogador** (ludanto), de **jogar** (ludi), **cantador** (kantisto) de **cantar** *musicaire* (muzikisto), de *musica*, ktp...



regionsavoie.org/index.php/noutra-lengua

La 30an de novembro 2019 la subtenantoj de Franciaj regionaj lingvoj manifestaciis en Parizo. Oni vidas la manifestaciantojn kuŝitajn proksime al la Ministerio pri Edukado. La franca standardo, kiel falĉilo, superas la okcitanan kaj la aliajn lingvojn.

-ut, -uda, havas la saman rolon kiel la esperanta “plena aŭ mult-a”, *pelut* signifas “multhara” (de *pèu* haro), *capborrut* signifas “kun *capborra*”, unu granda *cap* (= kapo), laŭvorte “obstina”.

-is kaj -umi helpas krei kolektivajn nomojn, kiel -aro: *mascle* (vira) donas *lo masclumi* (la viraro), *fumèla* (ina), por bestoj ĝenerale, povas doni *lo fumelis* (la virinaro) kaj *lo herumi* signifas “la sovaĝaj bestoj”.

Ĉiuj tiuj sufiksoj povas kompreneble intermiksiĝi kaj tiel krei novajn gustegajn vortojn:

Lo pèc estas la stultulo, *lo pegàs* estas granda simplulo, *lo pegassòt* faras negravajn stultaĵojn, *pegassejar* signifas “stultumi por amuziĝi” kaj *lo pegassejaire* amuziĝas tiel.

Se *la lenga* estas la parolilo, *la lengassa* estas, simbole, granda lango (kiu do multe parolas), *lengassejar* signifas paroli tro, kaj eĉ klaĉi; kaj *lo lengassejaire*, li tro parolas ĉar li estas *lengassut*, aŭ parolema.

Du vortoj tre okcitanaj

Jen nun du vortoj, kiuj estas tre utilaj por esprimi senton aŭ ideon. Ili estas iloj ĉien enmeteblaj. La unua estas pozitiva:

Un brave ...

Unu afabla...

Tiu adjektivo povas esprimi samtempe la afablecon, la bonkorecon, sed ankaŭ sufiĉan kvanton, pozitivan aspekton, ktp.

Un brave dròlle → *Un brave còp de vin*

Obeema infano → Bona kvanto de vino

Un brave còp de rastèth

Forta kaj rapida uzo de rastilo

Jen la dua, la mala, la negativa:

Un maishant ...

Unu malbona ...

Tiu alia adjektivo povas do esprimi la malafablecon, nesufiĉan kvanton, la malbelecon kaj iun ajn negativan aspekton.

Un maishant dròlle → *Un maishant capèth*

Neobeema infano → Malnova, malpura ĉapelo

Un maishant còp de rastèth

Fuŝfarita rapida uzo de rastilo

Vi komprenos la nuancojn de tiuj adjektivoj per tiuj du ekzemploj:

Gahèc un brave truc de baston. →

Li ricevis fortan bastonfrapon.

(Bone, ĉar li estis malagrabla) →

Gahèc un maishant truc de baston.


Li ricevis fortan bastonfrapon.

(Kompatindulo!)

JoMo

Noto:

(1) La titolo *Ramelet Moundi*, oni ĝenerale tradukas per Tuluzo bukedo, sed ĝi estas plursignifa. *Ramelet* povas ankaŭ signifi “branĉeto”. La vorto *Moundi*, kiel klarigas pli poste la aŭtoro, elvokas la nomon de la tuluzaj grafoj *Ramon* kaj tial nerekte signifas “el Tuluzo”. Laŭ la franclingva artikolo de Vikipedio, tiu *Moundi* povus esti ludvorto ankaŭ signifanta “mondo”, eĉ “Dio” aŭ “miadire”. (NdR)



El Vikimedia: Aŭtoro: Nimlar.

Standardo el Okcitanio.

Udmurtio: li fajrigis sin por protesti kontraŭ la lingvomortiga politiko de Rusio

La 10an de septembro mortis en hospitalo de *Iĵ*, la ĉefurbo de Udmurtio, *Albert Razin*, 79-jara doktoro pri filozofio, post kiam li fajrigis sin por protesti kontraŭ la rusia politiko pri la udmurta lingvo, laŭ raporto de Radio Libera Eŭropo. (1) *Razin* mortigis sin apud la udmurta parlamento, dum li portis du afiŝojn kun la tekstoj «Se mia lingvo mortos morgaŭ, tiam mi pretas morti hodiaŭ» kaj «Ĉu mi havas patrujon?». Per la unua li citis la avar-lingvan poeton *Rasul Gamzatov* (la tuta poemo aperas sur la vidalvida paĝo kun la titolo, «Mia gepatra lingvo») Kelkajn semajnojn antaŭe, la fama kaj ordenita



[ewsfound.com/ukraineeng/albert-razin-dies-activist-burns-in-udmurtia/](https://www.ewsfound.com/ukraineeng/albert-razin-dies-activist-burns-in-udmurtia/)

Albert Razin.

profesoro sendis longan leteron al la udmurta parlamento.

Per ĉi tiu ago *Razin* plenumis *tipŝar*. Tio estas antikva udmurta tradicio konsistanta en “memmortigo antaŭ la malamiko”, kiam “estas neniu alia rimedo por restarigi la justecon”, laŭ klarigo de unu el la multnombraj kondolencaj mesaĝoj. (2)

En la momento de sia memmortigo *Razin* faris tion, kion en Rusio oni nomas “unu-homa protesto” (*одиночный пикет*). Temas pri formo de protesto tolerata de la aŭtoritatoj, en kiu unu sola homo povas manifestacii en publika loko portante, kiel *Razin* faris, afiŝojn kun siaj depostuloj. Ĉiu ajn alia tipo de protesto kun pli da partoprenantoj bezonas permeson, kiun la administracio malemas doni.

Nova leĝo malpermesas la devigan instruadon de la minoritataj lingvoj

Jaron antaŭe *Razin* estis unu el la instigantoj de peticio al la udmurta parlamento, por ke ĝi kontraŭstaru federacian leĝon, kiu malpermesas en tuta Rusio la devigan instruadon de iu ajn minoritata

lingvo kaj krome limigas ilian fakultativan instruadon per forta redukto de la klashoroj. Ĉi tiu leĝo, fine aprobita, estas aplikata al ĉiuj rusiaj lingvoj krom la rusa, inkluzive de tiuj, kiuj havas la rangon de oficialaj lingvoj en la diversaj regionoj de Rusio nomataj “respublikoj”, kiel okazas pri la udmurta. La leĝo eĉ permesas la uzon de tiuj horoj por plilarĝigi la instruadon de la rusa, konsiderante, ke ĝi estas denaska kaj oficiala lingvo por multaj loĝantoj de tiuj “respublikoj”.

Oficiala lingvo pli kaj pli minora

La udmurta estas finn-ugra lingvo parolata de ĉirkaŭ 300 000 homoj plimulte loĝantaj en Udmurtio, sed ankaŭ en la najbaraj regionoj de Baŝkortostano kaj Tatarstano. Temas pri la dua plej multe parolata finn-ugra lingvo de la Rusia Federacio tuj post la marea lingvo, kiu havas nemulte pli da parolantoj. Tamen, malkiel okazas pri la marea, la udmurtoj estas klara malplimulto en Udmurtio, regiono famiĝinta pro siaj armil-fabrikaj, ĉefe pro la Kalaŝnikov-korporacio. Tio tre malfaciligas ilian influkapablon sur la lingvopolitikon kaj la konservadon de la lingvo, kiu de pluraj jardekoj ludas ekstreme etan kaj flankan rolon en la eduk-sistemo de la regiono.



https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/2/2a/Udmurt_in_Russia.svg

Situo de Udmurtio en la Rusia Federacio.

«Estas neniu kaŭzo»

Malgraŭ tio, eksciinte la malĝojan novaĵon de la morto de *Razin*, *Vladimir Zorin*, unu el la konsilistoj de *Vladimir Putin* pri naciaj malplimultoj, deklaris, ke «estas neniu kaŭzo» por lia ago, ĉar la udmurta estas konsiderata oficiala lingvo en Udmurtio kaj «estas neniu kaŭzo» estas neniu kaŭzo. (3)

Notindas, ke temas pri fakultativaj kursoj ekster la lernejoj, kiuj povas esti organizitaj de iu ajn asocio. Ne temas, do, pri lernejoj klasoj por signifa nombro da infanoj de la koncernata nacieco aŭ respubliko.

Malpli ol po unu horo semajne

La israela spertulo pri la rusia lingvopolitiko *Nail Gilman* konsideras, ke «rilate la lernejan instruadon de la indiĝenaj lingvoj la udmurta troviĝas en la plej malbona situacio el la lingvoj de la ĉefaj naciecoj de Volgio», (4) en kiu koncentriĝas ses respublikoj, inter kiuj Udmurtio, Tatarstano, Baŝkortostano kaj *Mari El*. Laŭ la donitaĵoj de la lingvisto, eltiritaj de lia blogo, en la urboj de Udmurtio la infanoj elektintaj lerni la udmurtan ne havas, en la plej bona okazo, pli ol unu horon en semajno da klaso.

Fakte, laŭ la udmurta aktivisto *Artem Otegi*, post la aprobo de la polemika federala leĝo, nur 5 lernejoj el la 80 en la tuta urbo *Iĵ* proponas la eblon lerni ĝis unu horon semajne la udmurtan. En neniuj aliaj urboj de Udmurtio oni proponas tiun eblon.

La nova leĝo plifortigas la rusan lingvon

Kontraste, laŭ *Gilman*, la nova leĝo estas uzata por proponi unu plian horon da rusa en la lernejoj kiel denaska kaj oficiala lingvo. Laŭ la israela spertulo nur en unu kampara distrikto kun pli ol 80% da udmurtlingva loĝantaro, la lernejoj povas havi ĝis po 3 horoj semajne da instruado de la udmurta kiel stud-

objekto, dum la tuta cetera instruado okazas en la rusa lingvo. (5)

De post la aprobo de la leĝo la registaro publikigis nenium donitaĵon pri la nombro de lernejoj lernantaj la udmurtan, nek pri tio dum kiom da horoj oni lernas ĝin. Sekve, la solaj informoj venas de aktivuloj kaj el enketoj faritaj de sendependaj esploristoj.

El *Jornalet*, *Gaseta occitana d'informacions*

<https://www.jornalet.com/nova/11502/odmortia-ses-mes-fuoc-per-protestar-contra-las-politicas-linguicidas-de-russia>

Notoj:

- (1) <https://www.rferl.org/a/man-sets-himself--fire-russia--udmurtia-language-protest-against-language-bill/30156654.html>
- (2) <https://www.facebook.com/s.savkila/posts/10156632799841239>
- (3) https://www.ridus.ru/news/307554?fbclid=IwAR1Nko0QHWLKrU_III0_M1GIKQg55LYuChOwRFJpdpzQ28wYFr-LSDRUem0
- (4) <https://www.facebook.com/tatarf/posts/1233202240192592>
- (5) https://idelile.blogspot.com/p/blog-page_11.html?fbclid=IwAR0LTP8JQINHFsalHsK2Nu-TJmOQ3VTmj5giupUq1A8UwJk7p0aLQYMcQ0

Mia gepatra lingvo

Tiaj frenezaĵoj ĝenas nin dum dormo
Lastnokte mi sonĝis, ke mi mortas:
En profunda abismo mi kuŝas nevidata,
Kuglo en mia flanko.

Riverego tondras ĉirkaŭe.
Vane mi atendas helpon.
Sur polva tero mi kuŝas,
Por baldaŭ esti polvo mi mem,

Ĉar neniuj scias, ke tie ĉi mi mortas,
Kaj nenio venas al la vido
Krom agloj moviĝantaj en la ĉielo,
Timida cervido aŭ du.

Por priplendi mian plej antaŭtempan morton
Kaj ploreti en solena ĥoro
Nek venas patrino, edzino, nek amiko,
Neniu el la vilaĝaj plendantoj.

Tamen, ĝuste kiam mi prepariĝas morti,
Neatentita kaj neprikantita,
Mi aŭdas du virojn pasantajn
Kiuj parolas mian gepatran lingvon.

En profunda abismo mi kuŝas nevidata
Mi langvoras, sed ili ĝoje
Rakontas la friponaĵojn de iu *Hasan'*
Intrigojn de *Ali'*.

Kaj, kiam mi aŭdas la avaran lingvon,
Mia forto venas fluante reen
Tio estas kuraco, kiun neniuj kleruloj instruas,
Balzamo, kiu al doktoroj mankas.

Aliaj lingvoj kuracu aliajn homojn
Je ilia aparta maniero,
Se mortus, tamen, morgaŭ la avara,
Prefere mi hodiaŭ mortu!

Ne gravas, ke apenaŭ ĝi uziĝas
Por altaj ŝtataferoj,
Ĝi estas la lingvo, kiun mi elektas,
Por mi la avara estas granda!

Ĉu la posteuloj legu nur
Tradukojn de *Mahmud'*?
Ĉu estas mi la lasta skribanto
Kaj tamen komprenata?

Mi amas tiun ĉi vivon, la tutan mondon
Mi spektas kun amanta rigardo.
Sed pleje amas mi Sovetan landon
Kiun mi -- avaralingve -- laŭdas.

Mi mortus por tiu ĉi laborplena lando libera
Kiu etendas sin okcidente kaj oriente.
Sed estu sur avara tero
Ke mi en mia tombo ripozos,

Kaj estu per avaraj vortoj
Ke Avaroj renkontiĝantaj tie
Parolas pri *Rasul'*, ilia samlandano, poeto.
De poeto filo kaj heredanto!

Poemo de *Rasul Gamzatov*

Tradukita el angla versio far *Dominik Schramm*

La lingvo-ilaro *Apertium* kaj la minoritataj lingvoj

Pli kaj pli ofte ni uzas en niaj komputiloj kaj poŝtelefonoj lingvajn teknologiojn. Delonge ne plu temas nur pri vortaroj, konjugaciiloj aŭ deklinaciiloj, sed ankaŭ ekz. pri voĉ-generiloj, voĉ-rekoniloj, skrib-rekoniloj kaj aŭtomataj tradukiloj. Tradukiloj jam fariĝis integra parto de multaj retejoj kaj programoj, kiel sociaj retoj kaj alispecaj kontaktejoj. Tamen aŭtomataj tradukiloj kaj aliaj lingvaj teknologioj ekzistas nur por eble ducento el la plurmilo da lingvoj en la mondo. Krome, eĉ inter tiuj proporcie malmultaj lingvoj la kvanto de iloj kaj ilia kvalito ege diversas.

La teknologio kutime uzata por krei aŭtomatajn tradukilojn estas fakte orientita al la “grandaj lingvoj”, kiuj disponas pri aliaj multnombraj rimedoj en interreto. Same la t.n. neŭronaj tradukiloj kaj la iom pli malnovaj t.n. statistikaj lernas el enormaj kvantoj da tekstoj, en tia nombro, kiu estas neatingebla por la larĝega plimulto de lingvoj en la mondo. Aliflanke, ili uzas la anglan aŭ la rusan kiel “pivotajn” lingvojn de siaj sistemoj, tiel ke la tradukoj en Guglo inter la bretona kaj la kimra (du keltaj lingvoj) aŭ inter la tataro kaj la baŝkira (tjurkaj lingvoj) okazas per duobla traduko tra la angla aŭ la rusa, respektive. Rezulte, la kvalito de la tradukoj inter proksimaj lingvoj kutime estas malpli bona, eĉ multe malpli bona, ol inter superreganta lingvo kaj minorigata. Tiel tiuj teknologioj parte reproduktas kaj plifirmigas la malegalecon inter lingvoj kaj la informfluo inter metropolaj kaj (eks)koloniaj lingvoj.

Apertium: iniciato de minoritat-lingvuloj

Meze de la 2000aj jaroj grupo de universitataj esploristoj kaj lingvoentreprenoj el Valencilando, Galegio, Eŭskio kaj Katalunio kuniĝis por krei aŭtomatajn tradukilojn inter la diversaj oficialaj lingvoj de Hispanio. El tiu iniciato naskiĝis *Apertium* kiel libera platformo por krei tradukilojn inter lingvistike proksimaj lingvoj. Komence tio estis por la galega, kataluna, hispana kaj portugala, sed rapide aldoniĝis pliaj lingvoj. Tradukiloj por Esperanto aperis inter la plej fruaj, unue el la kataluna kaj hispana, poste el la angla kaj la franca. Funkcias ankaŭ tradukilo el Esperanto al la angla.

En septembro 2019 estas disponeblaj 49 tradukiloj por pli ol 20 lingvoj. Elstaras la forta reprezentiĝo de minoritataj lingvoj kiel la afrikansa, la aragona, la asturia, la belorusa, la bretona, la eŭska, la galega, la kataluna, la kazaha, la kimra, la malta, la okcitana, la nord-samea, la sarda, la silezia, la tataro, la krime-

tataro kaj la ukraina. Estas rimarkinde multa laboro farita ankaŭ pri aliaj lingvoj kiel la bengala, la ĉuvaŝa, la feroa, la gvarania, la korsika, la kurda, la marata, la saĥa, la sud-samea kaj la uigura. En la sistemo tute mankas centra lingvo, sed male temas kutime pri tradukiloj inter proksimaj lingvoj, kiel tradukiloj inter latinidaj, inter skandinaviaj, inter slavaj kaj inter tjurkaj lingvoj. Aliaj ekzemploj estas la afrikansa-nederlanda, la malaja-indonezia, la malta-araba kaj la urdua-hindia. Rimarkindas, ke por pluraj el tiuj lingvoj mankas tradukiloj en la komercaj tradukiloj de Guglo, Mikrosofto kaj *Jandeks*.

Kvankam ekzistas kelkaj entreprenoj kaj fakuloj, kiuj profesie okupiĝas pri *Apertium* kaj ankaŭ kelkaj publikaj organizoj, kiuj uzadas ĝin kaj financas plibonigojn, ĝi estas esence laborejo por universitataj esploristoj kaj studentoj kaj ilo por lingvoaktivuloj. Ĝia arkitekturo klare disigas lingvajn donitaĵojn disde programadaj elementoj. Tial nemalmultaj kunlaborantoj ne estas komputilistoj.

Sistem-arkitekturo

Kerna aspekto de la *Apertium*-tradukiloj estas, ke ili konsistas el diversaj klare difinitaj eroj. La plej gravaj estas dulingvaj vortaroj kaj unulingvaj morfologiaj vortaroj. Ĉi-lastaj temas pri la difino de la diversaj formoj, kiujn havas vorto depende de la nombro, genro, kazo, tenso k.a. Tiuj tradukil-komponentoj estas farataj de homoj konantaj la lingvojn. Tio signifas, ke la lingvo-scioj ne estas iamaniere induktitaj surbaze de vasta aro de materialoj troveblaj en interreto. Plej ofte temas pri “mana” laboro: tajpado de vortoj, difino de iliaj vortoformoj kaj tradukoj, tamen foje eblas kolekti donitaĵojn, kiuj estas disponigataj de aliaj liberaj retejoj aŭ programaroj, ekz. la Vikivortaroj, Vikipedioj, la *LanguageTool*-literumiloj k.a. Ekzemple, la Esperanto-tradukiloj de *Apertium* multe ŝuldas al la Reta Vortaro. Siavice, ĉiuj materialoj (lingvaj aŭ programadaj) produktataj kadre de *Apertium* estas libere disponigataj en interreto por nekomercaj celoj en la malfermit-koda retejo *GitHub*. Ekzemple, la pola-silezia vortaro estas elŝutebla en la adreso <https://github.com/apertium/apertium-pol-szl> kaj la morfologia vortaro de la sarda ĉe <https://github.com/apertium/apertium-srd>.

Inter la diversaj uzoj de tiuj rimedoj, eblas mencii, ke en 2010 el la kataluna-esperanta vortaro estis aŭtomate kreita tradicia vortaro kun 19 000 kapvortoj, kiu estas libere elŝutebla el la reto. Preskaŭ dek jarojn

poste ĝi restas la plej granda kataluna-esperanta vortaro. Alian interesan ekzemplon liveras la tatara lingvo, por kiu tre malsamaj uzoj estas farataj de ĝia morfologia komponanto en *Apertium*. De unu flanko, oni kreis el ĝi literumilon, t.e. ortografi-kontrolan programon. Aliflanke oni uzas ĝian morfologian analizilon por tekstaro libere konsultebla en interreto.

Funkciado

La bazo de la funkciado de la tradukilo estas surprize simpla. Temas pri laŭvorta tradukado... kun modifoj. Tiuj modifoj estas ŝlosila aspekto de la tradukado, pro tio la formo entrepreni ĝin evoluis el la komencaj tradukiloj inter iberiaj latinidaj lingvoj, kiujn pluraj jarcentoj da interkontakto igis sintakse kaj semantike tre similaj, al nuntempaj projektoj por krei kvalitajn tradukilojn inter lingvoj el malsamaj familioj kaj malmultaj kontaktoj, ekzemple la kazaha kaj la angla. Ĉiuokaze, pro sia baza strukturo *Apertium* estas kompreneble pli taŭga por traduki inter lingvistike proksimaj lingvoj.

Inter tiaj lingvoj la tradukiloj de *Apertium* montriĝas foje pli sukcesaj ol tiuj de Guglo, malgraŭ la enorma diferenco de rimedoj inter la du organizaĵoj. Tiel okazas ekzemple por la tradukiloj inter la kataluna kaj la hispana, la portugala kaj la itala (kaj certe ankaŭ al la aragona, okcitana kaj sarda, por kiuj Guglo ne liveras tradukilojn). Same okazas en la tradukiloj inter la skandinaviaj lingvoj.

La rapideco kun kiu kreiĝas nova tradukilo dependas de diversaj faktoroj, kiel la jama ekzisto de rimedoj por tiuj lingvoj en *Apertium* aŭ ĉe aliaj liberaj rimedoj en interreto. Aliaj gravaj faktoroj estas la proksimeco de la lingvoj, la sperteco de la partoprenantoj kaj la tempo, je kiuj ili disponas. En tri sinsekvaj someroj de 2016, 2017 kaj 2018 duopoj, konsistantaj el sperta disvolvanto de *Apertium* kaj homo bone konanta la koncernan lingvon, sukcesis krei nemalbonajn tradukilojn de la itala al la sarda, de la kataluna al la sarda kaj de la franca al la okcitana.

Celoj kaj direkto de la tradukiloj

Indas atentigi, ke fakuloj distingas du ĉefajn celojn de aŭtomataj tradukiloj. La unua temas pri simpla konatiĝo kun la enhavo de dokumento. Tio utilas, kiam la lingvo estas tute ne konata de la uzanto de la tradukilo. La dua temas pri kreado de malneto de bona traduko. La tekstoj produktataj de aŭtomata tradukilo estas reviziendaj kaj neniookaze devus esti publikigitaj sen homa kontrolo, aŭ almenaŭ sen klara atentigo pri ilia nefidindeco. En la ĉi-lastaj okazoj la celo estas la rapidigo de la tradukado de nebeletraj tekstoj, ĉar la tempo postulata de aŭtomata tradukado sekvi de revizio, se la unua atingas difinitan kvalitsojlon, estas pli rapida por egala kvalito ol rekta "klasika" homa tradukado.



Apertium

El Vikimedio. Aŭtoroj: Francis Tyers, Andrej Slapnik.

Bildsimbolo de *Apertium*.

Problemo, kiel ni ĉiuj iam spertis, estas, ke aŭtomataj tradukoj estas foje senpere publikigataj. Tio estas farata ne nur de kelkaj diletantaj vikipediistoj dezirantaj ĉiakoste multigi la nombron de artikoloj en sia lingvo, sed, multe pli zorgige, foje ankaŭ de oficialaj instancoj pretendantaj tiel ŝajnigi subtenon al minoritataj lingvoj sen ajna investo en homaj rimedoj kaj instruado. Tio metas la kreantojn de aŭtomataj tradukiloj antaŭ dilemon. Ekzemple, la disvolvintoj de la *Apertium*-tradukilo el la nord-samea al la norvega decidis ne liveri inversan direkton. Unu el iliaj ĉefaj celoj estis la lingva "aŭtonomigo" de la norvegiaj nord-sameoj, kiuj per tiu ilo povas pli memfide uzi sian lingvon sen ĉagreniĝoj pri tio, ke ili ne tradukas informojn al la superreganta norvega lingvo. Tio faciligas, ekzemple, ke la nord-sameaj lernejoj informu la gepatrojn ĉefe en la lingvo de la lernejo kaj ne perdu la tempon ĉion tradukadi norvegen (aŭ pli malbone: informante nur norvege), malgraŭ tio, ke parto de la gepatroj ne regas la nord-samean. La tradukilo ebligas al tiuj gepatroj konatiĝi kun la informoj de la lernejo kaj, se necese, peti aldonajn klarigojn. Tiu problemoj estas aparte zorgiga en landoj, en kiuj la aŭtoritatoj montras tre malgrandan emon investi en kadrulojn parole kaj skribe kompetentajn en minoritataj lingvoj, tamen samtempe emas ŝajnigi sin ĉampionoj pri la subteno de tiuj lingvoj.

Problemoj kun la minoritataj lingvoj

Indas rimarkigi kelkajn problemojn, kiujn alfrontas la kreantoj de komputikaj lingvaj iloj je multe pli gran-

da grado ol spertas tiuj okupiĝantaj pri lingvoj kun longe establita normolingvo.

Unu ekzemplon donas la sarda lingvo. Ĝiaj multaj diversaj parolvarioj estas grupigitaj de lingvistoj en du ĉefajn dialektojn: nordan kaj sudan. La norda konservas en pli alta grado la trajtojn, kiuj plej elstarigas la sardan disde ĉiuj aliaj latinidaj lingvoj, sed la ĉefurbo troviĝas en la pleja sudo de la insulo, kio donas al la suda dialekto fortan pezon. Plej grave estas, ke mankas skriba tradicio. De jarcentoj Sardinio estas periferia parto de pli grandaj ŝtatoj, kaj la administrado funkciadis kaj daŭre funkcias en aliaj lingvoj: latina, kataluna, kastilia kaj, ekde la 18a jarcento, itala. Tio ne signifas, ke la sarda neniam estis skribita, tamen la nemultaj aŭtoroj en ĝi ĉefe verkis surbaze de ilia loka lingvovarianto kaj la ortografiaj normoj de la superreganta lingvo. Nur antaŭ nelonge estis entreprenitaj provoj krei tut-sardan norman lingvon. Tamen, kiel kutime, estas malfacile atingi interkonsenton.

La interkonsentoj por fiksi norman lingvon alfrontas tipajn problemojn, sendepende de la lingvo. Unuflanke indas iagrade limigi la amason da plej ofte ege similaj lokaj variantoj por preskaŭ ĉiu ordinara vorto. Aliflanke necesas elekti nur unu-du variantojn, kiam temas pri morfologio (ekz. verbaj finaĵoj). Simile, staras la problemo pri la akceptebleco de vortoj aŭ vortoformoj devenantaj de la socie dominanta aŭ dominanta lingvo. Foje ili estas delonge kaj vaste uzataj, foje tio okazas nur en difinitaj medioj, ekz. ĉe mez-klasaj urbanoj, pli ofte uzataj la regantan lingvon ol la minoritatan. Tial la aldono de multaj tiaj vortoj aŭ vortoformoj en la norman lingvon foje igas, ke la kutimaj parolantoj de la lingvo konsideras la normopropozonon kripla urbana ĵargono. Iom alispeca problemo staras pri strikte ortografiaj elektoj por skribi iujn sonojn de la lingvo. Iuj preferas la ortografiajn tradiciojn de la superreganta lingvo, dum aliaj emas al malnovaj (ofte forgesitaj) skriboj aŭ/kaj pli adaptitaj al la ecoj de la koncerna lingvo aŭ de lingvistike proksimaj lingvoj. Tiaj ortografiaj elektoj pro la simboleco de skribado kaj la proksimiĝo aŭ malproksimiĝo al aliaj lingvoj, kiujn ili implicas, ofte vekas senfinajn akrajn diskutojn.

Apud tiuj problemoj, ni diru, teknikaj, staras eble la plej grava: kiam mankas establita tradicio kaj la parolantoj ne estas en konstanta kontakto kun norma lingvo pere de la edukistemo, gazetoj, televido, radio, surstrataj afiŝoj kaj laboro, tiaj elektoj estas ĉiam diskuteblaj kaj polemikaj... des pli ke multaj homoj ne vidas ilian bezonon. Do, eĉ en la nekutima okazo, ke nova normo de lingvo sukcesas atingi relative vastan subtenon de intelektuloj, ĝia disvastigo inter la potenciala uzantaro malfacilas.

Kiam oni konstruas aŭtomatan tradukilon, ni la tutan tempon alfrontas tiajn decidojn kiel: Kiun el la multaj variantoj de "bela" uzi? Aŭ kiun el la diversaj

variantoj de, ni diru, la imperfekta pasinto elekti? Aŭ eĉ, ĉu uzi tiun tenseon, kiu estas plene vivanta en partoj de la lingvoareo, sed arkaika en aliaj? Tiaj demandoj certe same staras antaŭ ĵurnalisto aŭ verkisto en lingvo kun malfirma normo aŭ sen ĝi, tamen ĝi estas aparte ŝancela por kreanto de aŭtomata tradukilo, kiu celas al kiel eble plej neŭtrala elekto, kaj kiu devas rapide kodigi decidojn por ne malpli ol 10 000 vortoj.

La korsika, la okcitana kaj la sarda

Tio ekzemple malebligis ĝis nun la enkondukon de la korsika lingvo en *Apertium*. Nuntempe mankas por ĝi aŭtoritataj vortaro kaj gramatikoj, kiuj klare orientus eventualan disvolvanton de tradukilo. Se pensi pri tradukilo al la korsika, ni tuj staras antaŭ senfino de malklaraj decidoj. La farendaj elektoj estus nur unu inter la multaj eblaj, sekve estas forta risko, ke la eventualaj uzantoj sentus sin nekomfortaj pro almenaŭ parto de la decidoj. Se krei tradukilon el la korsika, necesas multigi la nombron de vortoj en la vortaroj pro la granda kvanto da ebloj. Por atingi simile kontentigajn rezultojn necesas investi multe pli da tempo ol por lingvo kun pli-malpli firma normo. Tion povus eventuale fari tre bona konanto de la lingvo kaj de la priaj diskutoj, tamen tia homo ankoraŭ ne proponis sin al la *Apertium*-komunumo.

Pri la okcitana la afero staras iom alimaniere. De pluraj jardekoj estas praktike atingita interkonsento pri la ortografio (la subtenantoj de la ortografio de *Mistral* fariĝas pli kaj pli malmultnombraj kaj marginaj, kvankam ili daŭre bruas en Provenco). Tamen la interkonsento ne iris multe trans tion. Kulpas grandparte la abomeno al la franca centralismego kaj ĝia korolaria pretendo, ke ekzistas nur unu ĝusta formo por ĉio franca en la Heksagono kaj la mondo. Sed kulpas ankaŭ la manko de popularaj amaskomunikiloj, kiuj vole-nevole disvastigus difinitajn vortojn kaj morfologiajn variojn, sekve malpliigus la diversecon de la lingvo.

En la kazo de la okcitana estas faritaj provoj krei dialektajn sub-normojn, kiel por la gaskona kaj la langvedoka, sed eĉ tio vokas fortan suspektemon kaj diskutojn. Ekzemple, en Valo de Arano ne estas uzata iu tut-gaskona normo, sed loka varianto de la lingvo surbaze de la tut-okcitana ortografio kaj la akcepto de iuj tut-gaskonaj elementoj. La kaŭzo ne estas tiom ia apartismo de la aranoj, sed la sento, ke por disvastigi la lingvon en vivosferojn, kie ĝi ne estis uzata, la parolantoj devas senti, ke ili vere uzas sian lingvon, kaj ne ion alian.

Sekve, en *Apertium* ne vere ekzistas tradukiloj el kaj al la okcitana, sed al la langvedoka kaj al la arana. Cetere, la tradukiloj el la kataluna resp. la hispana al la langvedoka produktas iom malsaman langvedokan ol produktas tiu el la franca al la langvedoka. Aldone, *Lo Congrès* (la normiga institucio de la okcitana lingvo) nuntempe pretigas tradukilon el la franca al la

gaskona kaj inverse, per kiuj kunekzistos tri okcitanaj varioj en *Apertium*. Aliflanke, la tradukiloj el la okcitana al la franca kaj la hispana tre malbone funkcias, se la origina teksto estas skribita en iu ajn el la nordaj dialektoj de la okcitana aŭ en la provenca. Kvankam ilia malsimileco kun la langvedoka aŭ la arana ne estas tiel grandaj, ke parolantoj ne komprenu unu la alian, ili estas sufiĉe gravaj, por ke ĝis nun tro granda parto de la tekstoj skribitaj en ili fariĝu nekompreneblaj por la tradukilo. Por la nordaj dialektoj malhelpas ĉefe fonetikaj ŝanĝoj, kiuj estas ortografie koditaj (ekz. “*cambra*” en la sudaj dialektoj, sed “*chambra*” en la nordaj), dum pri la provenca malhelpas la artikolo kaj iuj finaĵoj. Do la manko de pli strikta komuna normo igas necesaj apartajn tradukilojn por praktike ĉiu dialekto de la okcitana, kaj eĉ verki tradukilon por nur unu el ili starigas nemalmultajn problemojn.

La situacio de la sarda estas iom pli bona. Tut-sarda normo estis instigita de la sarda registaro kaj estis fine aprobita en 2006, post malsukcesa unua provo en 2001 kaj dua en 2003. Tamen denove, la interkonsento estas ĉefe ortografia. Kvankam ekzistas iuj kriterioj rilate al leksiko kaj morfologio, multo estas ankoraŭ diskutata kaj interkonsentenda. Apertiumanoj provis kunmeti tekstaron de beletraj kaj gazetaj tekstoj verkitaj en la nova normo. Kvankam tiu ilo estis helpa en diversaj decidoj, ofte la kolekto montriĝis tro malgranda. Ankoraŭ malmultas tekstoj skribitaj laŭ la nova normo por indukti firmajn tendencojn en difinitaj elektoj. Fakte tial por la sarda, kiel por la plimulto de lingvoj, la “grandaj” komercaj firmaoj ne povas produkti tradukilojn.

François Hounsouno

La beninaj lingvoj kaj dialektoj.

Benino estas malgranda lando. Ĝi troviĝas inter Niĝerio kaj Togolando en okcidenta Afriko. Ĝi havas almenaŭ 11 milionojn da loĝantoj kaj pli ol 114 mil kvadratajn kilometrojn da areo.

En Benino estas 56 lokaj lingvoj parolataj en diversaj anguloj. Tiuj lingvoj estas dividitaj en 9 grupoj: la fonua (aŭ fongbea), la joruba, la bariba-, la *dendi*, la *goun* (aŭ *gung-be*, *gungbea*), la *adja* (aŭ *adjagbe*, *adjagbea*), la *ayizo* (aŭ *ayizo-gbe*) (1) ktp.

La fonua popolo parolas do la fongbean lingvon. Sed la fongbea, la gungbea kaj la adjagbea devenas el togolanda urbeto *Tado* (2)

La fongbea estas la plej parolata lingvo en Benino kun 44% de la loĝantoj, ĉefe en la centro kaj en la sudo. Poste venas la joruba (14%) en la sudo, la bariba (13%) en nordo, la gungbea (12%) en sudo, la adjagbea, la *xla*, *guingbea* (11%) en la sudo, la *aizo* (8%) en la sudo, la *ditamari* (5%) en nordokcidento,

Sekve, okaze de la apero de la *Apertium*-tradukilo de la itala al la sarda en 2016 estis kritikoj pri tio, ke la produktita sarda estis tro “norda”. Tamen lingvaj komputikistoj apenaŭ povas atingi iaspecan ekvilibron inter dialektoj, se ne sukcesas fari ĝin la lingvokomunumo mem. Kaj ilia eventuala klopodo forte riskas esti taksata kiel frankenŝtejnaĵo aŭ fantazio de kabinetuloj.

Ebla solvo de tiu problemo estus krei du subnormojn kaj du tradukilojn: nord-sardan kaj sud-sardan. Tamen denove tia elpaŝo por la sarda ne devas esti tasko de lingve senaŭtoritataj komputemuloj, sed plenkonscia decido de la lingvokomunumo. La sankcio de du subnormoj signifas la akcepton pri la neebleco establi plene komunan tut-sardan normon, kaj al tio nuntempe pretas nek la plimulto de la intelektularo nek la registaro.

Kiel kunlabori?

Dezirantoj kunlabori kun *Apertium* povas fari tion per tre diversaj manieroj. Unu estas disponigi materialojn, kiel unulingvajn aŭ dulingvajn vortolistojn. Pli aktiva maniero estas engaĝi sin en la pliampleksigon de la vortaroj. Tiel faris ekz. katalunaj vikipediistoj por la kataluna-franca vortaro, ĉar tio helpis ilin en ilia laboro traduki artikolojn de la franca Vikipedio. Tamen la plej aktiva formo estas transpreni la disvolvado de nova tradukilo aŭ la plibonigon de jam ekzistanta. Por tiuj disvolvadoj *Apertium* ĉiujare ricevas dekkelkon da stipendioj de Guglo por universitataj studentoj (inkluzive de doktoriĝantoj sen ajna aĝlimo) kadre de la iniciato “Somer-kodado de Guglo”

HAiF



El Vikimedia. Aŭtoro: Vardion.

Situo de Benino en okcidenta Afriko.

la lingvo *tem* (4%) en la nordo, la lingvo *yom* (3%) en nordo, la lingvoj *peul*, *fulfulda* (2%) en la nordo, la lingvo *nago* en la centro, la lingvoj *rodin* kaj *toli* en la sudo, la lingvo *ede-idaashu* en la centro kaj en la sudo, la lingvo *dendi* en la nordo, la lingvo *waama* en la



El muta mapo de Vikipedio.

Aŭtoro: Gyf.

Departementoj de Benino.

nordokcidento, la lingvoj *nateni*, *haoussa* en la nordo. Sed la *haoussa* devenas el la lingva familio niĝero-kongola.

Escepte tiuj menciitaj indiĝenaj lingvoj, estas aliaj kiel la lingvoj *biali*, *lokpa* en la nordokcidento, *mbelima*, *foodo*, *wemegbe* en la sudo, *tŝi*, *popo*, *kotafon*, *watŝi*.

Nur la plej parolataj el tiuj lingvoj havas alfabeton kaj tial povas esti skribataj.

En Benino oni facile konas la popolon/etnecon de persono per la lingvo, kiun li/ŝi parolas. Malgraŭ tiuj diversaj indiĝenaj lingvoj, la oficiala lingvo estas la franca, instruata en la lernejoj. La fongbea estas instruata de la projekto "Hungaref". Temas pri tute privata programo, kiu ne eniris lernejojn.

La franca estas parolata de ĉirkaŭ 35 % de la loĝantaro, ĉefe en la urboj. La lokaj lingvoj restaj tre

viglaĵ, kvankam tute ne uzataj en la oficiala eduksistemo. **FH**

Seminario pri la fonua lingvo kaj Esperanto

Oni povas legi sur Vikipedio en Esperanto, ke seminario pri la fonua lingvo kaj Esperanto okazis de la 18a ĝis la 23a de januaro 2015, organizita de la asocio Scio Sen Bariloj (SBB). Temis pri seminario por virinoj, kiu celis enkondukon al la skribado kaj legado de la fonua lingvo kaj de Esperanto. Instruis *Privas Tchikpe*, *Mireille Grosjean*, *Ladislav Tande* kaj *Christophe Hounto-Ada*. Simila seminario okazis unu monaton poste kaj estis anoncita unu fine de oktobro 2019.

NdlR

el https://eo.wikipedia.org/wiki/Fonua_lingvo

Notoj:

(1) Tiu sufikso *-gbe* signifas, ke la lingvo apartenas al la gbea lingvaro parolata inter orienta Ganao kaj okcidenta Niĝerio. Vidu:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Gbea_lingvaro (NdR).

(2) Tado estas togolanda urbeto situanta je 3 km de la landlimo kun Benino. El ĝia regiono nomita *Tado*-regiono originas la popolo *adja*. Tiu ĉi regiono kreiĝis kiel lando, konfederacio pluretna, jam en la 12a jarcento kun la ĉefurbo *Tado*. Ĝiaj posteuloj estas la popoloj *adja*, *funea*, *evea*, *gunea* ktp (NdR).



Foto de la aŭtoro, *François Hounou*, esperantisto de Benino. Jen eltiraĵo de dialogo: «mi parolas *tŝi*. Jes la lokaj lingvoj ege gravas por ni dum la komunikado. Ĉar la analfabetoj estas pli multaj ol la aliaj. Mi plej ofte uzas *tŝi* aŭ *kotafon*. Mi nur uzas la francan, kiam mi estas en la laborejo.»

Kimra kulturfesto plu

La Nacia *Eisteddfod*, Eistedvodo (1), kiu okazas dum la unua semajno de aŭgusto ĉiun jaron, estas festo de la kulturo kaj lingvo en Kimrio.

La festivalo vojaĝas de loko al loko, alternante inter norda kaj suda Kimrio, allogante ĉirkaŭ 150 000 vizitantojn kaj pli ol 250 vendejojn kaj budojn. Inter ili estas librovendejoj kaj eldonistoj. La festivalo de 2019 okazis sur kampoj apud la urbeto *Llanrwst*, nelonge for de mia hejmo. Mi mem provas ĉeesti ĉiun festivalon en la nordo. Ekzistas miloj, kiuj partoprenas ĉiujare, tendumante apude.

Oni povas trovi spurojn de la festivalo jam en 1176, sed la moderna historio de la evento vere datumas de 1861. La festivalo okazis ĉiujare, krom 1914, kiam la eksplodo de la unua mondmilito devigis la organizantojn prokrasti je unu jaro.



Fotis Elinor Chapman.

Malgraŭ pluvo, solkantistino prezentas programon al malgranda spektantaro meze de kampo.

Tradicie konkurso-bazita festivalo, altiranta pli ol 6000 konkurantojn ĉiun jaron, la festivalo disvolviĝis kaj evoluis dum la lastaj jaroj, kaj dum la centra fokuso de la semajno estas la konkursoj, la *Maes* (kampoj) mem kreskis kaj disvolviĝis en viglan festivalon, kun centoj da eventoj kaj agadoj por la tuta familio. Ekzemple estas granda tendo pri scienco kun aktivecoj kimralingvaj.

La plej multaj ĉefaj verkistoj, muzikistoj, kantistoj kaj poetoj de Kimrio konkuris iam ĉe la *Eisteddfod*, kaj multaj prezentistoj aperis sur nacia scenejo la unuan fojon dum la festivalo.

La *Eisteddfod* estas la natura montrofenestro en Kimrio por muziko, danco, vidaj artoj, literaturo, kaj multo pli. Ĝi celas esti inkluziva kaj bonveniga festivalo, kiu allogas milojn da gelernantoj de la kimra lingvo kaj tiujn, kiuj ne parolas la lingvon ĉiujare.



El Vikimedia.

Situo de Kimrio en Britio.

Portebla traduka servo (al la angla) estas disponebla, kaj skribaj dulingvaj informoj haveblas en kelkaj lokoj. Sed la kimra restas la ĉefa uzata lingvo.

La semajno de la *Eisteddfod* estas la kulmino de dujara komunuma projekto, kuniganta homojn de ĉiuj aĝoj kaj fonoj el malsamaj partoj de Kimrio. Mi mem havis la honoron prezidi lokan komitaton, kiu kolektis monon por la festivalo ekde januaro 2018 pere de koncertoj, kafo-matenoj, ekskursoj k.t.p. Tiuj aranĝoj mem riĉigis la socian kaj kulturen vivon de nia komunumo.

Nu, en 2019, ni eble ne havis la veteron, kiun ni esperis, ĉar pluvis foje, kaj estis koto sur la festivalaj kampoj fine de la semajno, sed io tute magia okazis denove.

BC

Noto:

(1) Jen termino kreita de *Reto Rossetti* antaŭ pli ol 70 jaroj. Vidu: La Kimraj Artofestoj en Somera Universitato: Malmö 1948. PIV ne enhavas la vorton “eistedvodo”, sed mi ja aŭdis ĝin, interalie de bretonaj esperantistoj.



Fotis Elinor Chapman.

Vira koruso *Cor Meibion Maelgwn* konkuras en la centra paviljono.

«Kostas denunci la malobservon de la lingvaj rajtoj»

Agurne Gaubeka, direktoro de *Hizkuntza Eskubideen Behatokia* (1), volas establi novajn labormanierojn en la direkcio de la Observejo: ŝi volas impulsi solidarecon kun asocioj favoraj al la homrajtoj, kaj ŝi prioritatas la “aktivigon” de la junularo.

Post 10 jaroj kiel direktoro de *Hizkuntza Eskubideen Behatokia*, ĵus lasis la postenon *Garbiñe Petriati*. Anstataŭis ŝin **Agurne Gaubeka** (Bermeo, Biskajo, 1984). Licenciĝinta pri laborsciencoj en la barcelona Universitato *Pompeu Fabra* kaj pri laborrilatoj en la Eŭska Universitato, ŝi disvolvis ĝis nun sian karieron en la sindikata medio en Katalunio kaj Eŭskio.

Vi komencis novan ciklon en *Behatokia*. Kiel vi sentas vin?

Mi alfrontas la defion kun granda ĝojo, kaj plezure mi aliros la taskon. Sed ĝi ankaŭ imponas al mi, ĉar temas pri respondeca posteno. Defendi la lingvaj rajtojn de la eŭsklingvanaro ne estas ia ajn plenumendaĵo: ĝi estas laboro de eksterordinara gravo.

Garbiñe Petriati lasis la direkcion, sed ŝi restos en *Behatokia*. Ĉu vi petos konsilon al ŝi?

Sendube. Min ege trankviligas scii, ke *Petriati* restos apude kiel vojkunulo kaj vigliganto. Ne necesas diri, ke ŝi estas tre sperta persono, sed, pli ol tio, rimarkendas ties firmaj engaĝiĝo kaj devontiĝo. Ene de organizo aganta por la defendo de civitanrajtoj tre valoras la enormaj empatio kaj ligoj, kiujn ŝi kreis kun la homoj. Tial, mi volas danki ŝin pro la farita laboro. valoras la enormaj empatio kaj ligoj, kiujn ŝi kreis kun la homoj. Tial, mi volas danki ŝin pro la farita laboro.

Ĝis nun, vi laboris en feminisma kaj sindikata fakoj. Ĉu vi iniciatos propran stilon en *Behatokia*?

Nu, en la lingva sfero ne, sed dum kelkaj jaroj mi agadis en la defendo de bazaj rajtoj, do la ĉefa akso de mia laboro ĉiam estis agi favore al minorigitaj personoj kaj kolektivoj. Tie komenciĝos mia kontribuo. Do, komencante per la mencio de la celoj kaj labormanieroj, kiujn mi iniciatos, mi ŝatus eki per la egaligo de la depostulo de lingvaj rajtoj kun tiu de la ceteraj homaj rajtoj. Mi ŝatus meti unujn kaj aliajn en la saman nivelon rilate la percepton kaj konsciigon de la homoj.

Ĉu la homoj ne same rimarkas kaj depostulas ĉiujn rajtojn?

Generale, ŝajnas al mi, ke la eŭskoj kutimas depostuli siajn lingvaj rajtojn, sed ne, ke oni samforte denuncas ĉiujn malobservojn de la rajtoj. Ni havas grandan farenadaĵon: al ni, eŭskoj, kostas antaŭenpaŝi kaj publike denunci, ke oni malobservis niajn lingvaj rajtojn.

Kial?

Foje, ĉar oni ne scias kien frapi; sed alifoje, ĉar tiu

demarŝo trolacigas, ĉar survoje oni trovas tro da malhelpaĵoj... Tial oni preferas fini tuj la aferon kaj eviti kapdolorojn. Pro tio gravas, ke ĉiuj eŭskoj sciu, ke *Behatokia* povas esti grava helpilo en la momento depostuli siajn rajtojn. Ili devas scii, ke ni estos ilia vojkunulo, kaj ke nia pordo estas malfermita por helpi iun ajn.

Ĉu normaligi la atakoj kontraŭ la eŭska lingvo?

Jes ja. Ŝajnas, ke nur la rajtojn de la aliaj oni devas respektikaj, kiam oni malrespektas la niajn, ni ne havas la kutimon aŭ sufiĉan forton por laŭtigi nian voĉon kaj protesti.

Kiel oni povas tion ŝanĝi?

Ni havas grandan farenadaĵon en la kadro de la konsciigo ĉefe je la junularo. Ni devas vekti la junulojn. Ili konsciu, ke estas rajtoj, kaj ke ili devus esti ĉiam garantiitaj. Kaj, kiam tio ne estas tiel, ili sciu, kien sin direkti, kion ili povas reklami kaj kiel. Kiam ili rilatas kun la administracio, kiuj estas la sekvendaj reguloj, formuloj... Scii ĉion ĉi estas fundamenta. Krom tio, al mi ŝajnas tre grave altiri aliajn kolektivojn agantajn en la defendo de la homaj rajtoj. Ili alprenu ankaŭ la lukton por la lingvaj rajtoj.

La urbestro de Irunjo volas ŝangi la regularon pri la eŭska lingvo por restrikti la ĉeeston de la eŭska. Kion vi opinias?

Tio ege zorgigas min. La urbestro *Enrique Maia* faris la unuan paŝon por ŝanĝi la regularon organizante publikan konsulton kaj, konsiderante liajn lastsemajnajn deklarojn, mi suspektas nenion bonan el la afero. En *Behatokia* ni timas, ke denove oni limigos la lingvaj rajtojn de la eŭsklingvanoj.

Navarra Suma (2) uzis kiel argumenton por kritiki la regularon la nivelon de uzado de la eŭska. *Maia* mem diris, ke, estante la surstrata uzo de la lingvo je nur 7 %, sensencas peti konon de la eŭska por ĉiuj alpublikaj laborpostenoj...

Jen, ĝuste, kio zorgigas nin. La argumentoj estas bedaŭrindaj, sed ili ekigis la diskuton je tia simplaĉa nivelo... Ĉu al iu venus en la kapon diri, ke oni agnoskos la rajtojn de la GLAT-kolektivo (3) laŭ la nombro de GLAT-personoj? Se ie ajn aŭtoritatulo eldirus tian sensencaĵon la homoj tuj alsturmus lin aŭ ŝin, kaj tute prave. Tio havas nenian sencon. Tamen, pri la eŭska kaj la eŭsklingvanoj kutimas aŭdi tiaĵojn.

Notoj:

(1) Eŭske Observejo de la Lingvaj Rajtoj.

(2) Hispane *Nafaro Adicias*. Temas pri balotkoalicio, limigita nur al Nafaro, inter la dekstregaj partioj *Unión del Pueblo Navarro* (Unuiĝo de la Nafara Popolo) kaj *Ciudadanos* (Civitanoj).

(3) Gejoj, Lesboj, Ambaŭseksemuloj kaj Transseksuloj.

Originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 27.09.2019.

Tradukis: *Nikolas Xil Carvalho*, Oktobro 2019-a.

Jam komencis labori la redakcio de la ĵurnalo “*Nós Diario*”(1)

La galeglingva ĵurnalo alvenos en la gazetkioskojn kaj interreton

«**N**untempe, en Galegio oni ne havas gazetan komunikilaron, ĉar la ĉitiaeaj gazetoj enportas la madridan agendon, kaj hispanlingve», deklaris *Maria Obelleiro*, kiu estos direktoro de la ĵurnalo *Nós Diario* (2). Ekde la venonta 2-a de januaro frakasiĝos la “historia nenormalaĵo”, ke ne estas galeglingva papera ĵurnalo. Pasintan merkredon eklaboris la ĵurnala redakcio.

La kernon de la ĵurnalista kaj dezajnista skipo konsistigas laboristoj de la gazeto *Sermos Galiza* (3). Fakte, la ĝermo de la ĵurnalo estas tiu gazeto kaj retejo. Ĝis la fino de decembro oni daŭre publikigos *Sermos Galiza*, sed ekde la 2-a de januaro ĝi iĝos la semajna suplemento, aperonta sabate, de *Nós Diario*. “La redakcio estas miksaĵo de homoj spertaj en galeglingvaj ĵurnaloj kaj ĵus diplimiĝintoj en la Universitato de Santiago (4).

Nuntempe en Galegio ne estas, krom la semajngazeto *Sermos Galiza*, papera ĵurnalo en la galega.

Merkrede kunvenis la nova redakcio de *Nós Diario*. Galegio estos la plej granda ĵurnalsekcio. Krom tiun oni prilaboros tiujn de politiko, socio, eduko, naturmedio kaj feminismo, kiel klarigis la direktoro. En la internacia sekcio oni pritraktos informojn el Eŭskio, Katalunio, Hispanio, Eŭropo kaj el la tuta mondo. *Traballo* (5) nomiĝos la sekcio pritraktanta ekonomiajn informojn. Alia granda sekcio zorgos pri kulturo kaj eventoj. “Tiun sekcion ni volas fortikigi, ĉar ĝi ĉiam estis grava kolono por *Sermos Galiza*.”

Numero nul

La redakcio jam laboras por pretigi la numerojn 0 de oktobro kaj novembro, sen presi ilin. Pasintan januaron ĝi anoncis, ke jam estis atingitaj 3000 abonantoj. Tio estas la kvanto celita por komenci. Sed tiuj estas nur individuaj abonoj. Nun ĝi ekmontos la ĵurnalon al lernejoj, asocioj, trinkejoj, butikoj, bibliotekoj kaj aliaj por atingi pliajn abonojn.

Nós Diario havos 32 kolorajn paĝojn. Oni publikigos ĝin de lundo ĝis sabato, sed la retan version oni ĝisdatigos ĉiutage. Oni ofertas diversajn abontarifojn, interalie eblos legi la retan version de la ĵurnalo ĉiutage kontraŭ 56 centimoj, abonante ĝin por tuta jaro.

Oni jam prilaboras temojn, kiujn la “kutima gazetaro” ne pritraktas: feminismo, galega diasporo, ekologiismo, historia memoro, galega lingvo, civilaj rajtoj kaj liberecoj, galega historio... “Fakte, ofte ni konas nur la historion, kiun oni rakontis al ni, ne nian historion de ni rakontitan”, klarigas *Obelleiro*. Kun la jaro 2020 naskiĝos *Nós Diario*. “Ni devos labori la 1-an de januaro.”

EL

Notoj:

- (1) Ni ĵurnalo.
- (2) nova ĉiutaga gazeto (NdR)
- (3) “Estu Galegio”, tutsemajna jam ekzistanta gazeto.
- (4) Santiago de Kompostelo.
- (5) Laboro.

Originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 3-an de Oktobro 2019-a. Tradukis: *Nikolas Xil Carvalho*, Oktobro 2019-a.



«Ni volas, ke la skotgaela estu alloga por la junularo», *Ceitlin Smith*, prezentanto de *BBC Alba* (1)

Antaŭ 11 jaroj kreigis *BBC Alba* por revivigi la skotgaelan lingvon. Malgraŭ tio, ke ĝia buĝeto por krei proprajn programojn estas tre malgranda, *Smith* substrekas ĝian bonan akcepton fare de la spektantaro.

Ceitlin Smith (*Obar Dheathain* (2), Skotio. 1992) lernis la skotgaelan danke al sia patro. «Tio helpis min atingi la lokon, kie mi nun estas», ŝi diras. Ŝi estas nun prezentanto de la televidkanalo *BBC Alba* kaj estis en Donostio por la renkontiĝo *Hizkuntza aniztasunaren erronkak ikus-entzunezkoen digitalizazio garaian* (3), organizita de *2deok*.

Antaŭ 11 jaroj naskiĝis *BBC Alba*, kun la celo revivigi kaj reakiri la skotgaelan. Kiun evoluon havis la televidkanalo?

Ni disponas malgrandan buĝeton: ĝuste 20 milionojn da pundoj (22 548 000 eŭroj). Du trionojn donas al ni la skota registaro kaj la alian trionon *BBC* mem. Pro tio ni ne povas krei tiom da propraj programoj, kiom ni ŝatus havi. Sed tiuj, kiujn ni faras, estas tre ŝatataj de la spektantaro. Ekzemple, ĵus ni faris raportajon pri la patrino de *Donald Trump*, kiu naskiĝis en Skotio, kaj ni rekte elsendis la matĉojn de la skota teamo en la Virina Futbala Mondpokalo. Ili havis tre bonan spektad-indicon. Ni ankaŭ precipe atentis pri la skota kulturo; tiu estas nia forta punkto. Tiuflanke ni tre ĝojas. Ni klopodas ensalti en tiujn breĉojn por proponi ion nian.

Ĉiokaze, la reakiro kaj revivigo de la skotgaela iras pli malrapide ol dezirinde, ĉu ne?

El la kvin milionoj da loĝantoj, kiujn havas Skotio, uzas ĝin nur 1 %. Tial nia celo estas ankaŭ stimuli tiun uzadon. Ni, la amaskomunikiloj, havas respondecon pri tio.

Sed kiel?

Ni volas igi alloga la skotgaelan ĉefe por la junuloj kaj adoleskantoj, ĉar estas ili la estonteco de nia lingvo. Ekzemple, al mi okazis, ke kiel infano mi parolis skotgale kun mia patro. Sed kiam mi komencis la gimnazion, la lingvo ne ŝajnis al mi alloga, kaj mi ekuzadis la anglan. Tion ni volas ŝanĝi, kaj por tio la televidserioj povas esti hoko. Aliflanke, ni volas pli bone loki niajn programojn en interreto, precipe en la platformo *BBC iPlayer*. La junularo pli kaj pli konsumas televidon de tie, kaj danke al ĝi niaj produktaĵoj povas esti konataj ankaŭ for de Skotio.

Por tia laboro, kion vi petas de la skota registaro kaj de la *BBC*?

De la registaro, pli da rimedoj, ĉar tiuj ebligas al ni pliampleksigi nian propran produktadon; de la *BBC*, helpi en la disvastigo de niaj programoj.



Ceitlin Smith

Kiuj estas la lingvopolitikaj gvidlinioj de *BBC Alba*?

Natureco kaj prudento estas niaj ĉefaj identigiloj. Ekzemple, ni ne kutimas uzi subtekstojn.

Krom prezenti, vi ankaŭ kantas. Kiujn trajtojn devas havi laboristo de *BBC Alba*?

Kio nin ĉiujn motivas, estas la amo al la skotgaela. Aldone al tio oni devas esti preta fari ion ajn. Fakte, ni estas malmultaj laboristoj.

AAG

Notoj:

(1) *British Broadcasting Corporation* (Brita Dissenda Korporacio). *BBC Alba* (ankaŭ *BBC Gàidhlig*) estas la skotgaela nomo de tiu televidkanalo por Skotio kaj ofte ĝi referencas al la skotgaela programaro.

(2) *Obar Dheathain* en la skotgaela. *Aiberdeen* en la skota. *Aberdeen* en la angla.

(3) «La defioj de la lingva plureco en la epoko de la aŭdovida ciferecigo» en la eŭska.

Originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 20-an de Septembro 2019-a.

Tradukis: NXC. Septembro 2019-a.



KONCIZE EL ...



El Vikimedia muta mapo.

postulas veran referendumon. Malfacilas, ĉar la armeo kaj polico indoneziaj daŭre provas timigi la lokanojn. En la jaro 2019 tamen amase kreskis protestoj kaj manifestacioj, ĉefe de junuloj. Kvankam dumsomere tiuj agadoj povis esti dokumentitaj, de kelkaj monatoj regas nigro, ĵurnalistoj kaj esploristoj ne plu ricevas vizojn. Ĉu senespera situacio por papuoj? Eble ne, post la ekzemplo de Orienta Timoro, kiu post tre malfacila

Okcidenta Papulando. Grandskalaj ribeloj kontraŭ Indonezio.

Dum la orienta parto de Nov-Gvineo sendependiĝis de Aŭstralio en 1975, la okcidenta duono de la insulo fariĝis, post turmentita periodo, oficiale indonezia en 1969. En tiu jaro ja okazis voĉdono por “libera elekto”: 1026 “delegitoj” zorge elektitaj de la indonezia registaro voĉdonis unuanime favore al tiu anekso, kaj tuj Unuiĝintaj Nacioj agnoskis tiun decidon. Ludis gravan rolon la usona minkompanio *Freeport Sulphur*, kiu jam prospektoris kaj povis ekspluati diversajn minejojn de la insulo, dividante la profitojn kun la indonezia registaro. La insulanoj estis grandparte diskriminaciaj homoj el aliaj insuloj ofte troloĝataj (interalie Javo), ili ricevis oportunaĵojn por establiĝi en Nov-Gvineo. Nun papuoj estas plimalpli 60 % de la loĝantoj kaj riskas iĝi malplimulto post kelkaj jaroj. Longe ekzistis gerilo far *Organisasi Papua Merdeka* (Organizo por Libera Papulando) sed en 2015 kreiĝis Unuiĝinta Movado por Libera Papulando, kiu funkcias kiel politika partio kaj

periodo sukcesis liberiĝi de Indonezio en 2002. **AF**

Alĝerio. Dekoj da homoj en karcero pro elmonro de amazigaj flagoj.


De pluraj monatoj okazas gigantaj manifestacioj en Alĝerio, cele al renverso de plene koruptita reĝimo (kaj ne nur de tute kadukiĝinta prezidento), kiu plagas la landon de pli ol kvindek jaroj, tio estas ne longe post la sendependiĝo en 1962. Ankaŭ de multaj jaroj amazigoj batalas por sia kulturo, postulante demokration en Alĝerio, tiel kuniĝante kaj simpatianta kun aliaj manifestaciantoj. Lastjunie dekoj da homoj aperis en marŝantaroj kun amazigaj flagoj. Ili estis tuj arestitaj, enkarcerigitaj kaj juĝitaj novembre. Pluraj tribunaloj liberigis ilin senpune, sed tiu de *Sidi M'hamed* kondamnis dudekon da homoj je ses monatoj en karcero. Laŭ la alĝeriaj konstitucio kaj leĝoj la posedo kaj elmonro de amaziga flago neniel devus konduki al juraj persekutadoj. Tiu verdikto kaŭzis tre fortan indignon, ne nur de kabiloj kaj aliaj



El Vikimedia, 09.02.2006.

Aŭtoro: *Nomadtales*.

«Libereco» en la angla. Surtrata skribaĵo por libera Papulando.



<http://www.koteka.net/flag.htm>.

Neoficiala standardo uzata de la Organizo por Libera Papulando, kromnomita “Matena Stelo”.

amazigoj, kio tutcerte ne kontribuos al la pacigo de la konflikto.

AF



<https://kabyle.com/communiqués/jour-du-drapeau-amazigh-le-30-aout>
Amaziga standardo.

Francio. Ministeriaj atakoj kontraŭ la instruado de minoritataj lingvoj.

Nenio nova sub la jupitera suno, oni povus diri, laŭ la kromnomo de la nuna prezidento, kiu fakte mem

lanĉis ĝin de sia Elizeo iĝinta Olimpo. Ĉar “Makronio” estas same kontraŭa al lingva diverseco kiel la politike tradicia Francio. Verŝajne la *start up nation* dezirata de la juna prezidento ne pli bezonas la alzacan, arpitanan, bretonan, eŭskan, flandran, katalunan, korsikan, okeitanan... ol finfine la francan mem. Ĉiukaze la ministro pri edukado, *Jean-Michel Blanquer*, provis limigi la instruon de minoritataj lingvoj interalie per malpermeso de merga instruado kaj malkuraĝigo de elekto de tiuj lingvoj en trapasado de ekzamenoj. Ŝajnas ankaŭ, ke novaj postenoj de instruistoj ne aperos, malgraŭ lokaj petoj. Tial, la 30an de novembro, instruistoj, lernantoj kaj aliaj koncernatoj el ĉiuj regionoj kuniĝis en Parizo por manifestacii kontraŭ tiuj atakoj. Tio okazis tute proksime al la ministerio pri edukado, bone protektita de policista kordono kaj tute ne preta ricevi delegitojn (Vidu bildon p. 9). Malmultaj amaskomunikiloj ĉeestis, tamen estis artikoloj en kelkaj tutfranciaj gazetoj kaj pli ofte en regionaj. Sed tiaj eventoj facile disvastiĝas pere de sociaj retoj, kaj la mobilizo devus daŭri des pli, ke ĝi estas subtenata de gravaj politikaj respondeculoj en diversaj regionoj.

AF


Urtzi Urrutikoetxea

La lernejoj de la rapanuia

La praloĝantoj nomas ĝin la “Umbiliko de la mondo”, en sia lingvo *Te pito o te hemua*. La popolo de Rapanuio (1) alfrontis ĉiajn katastrofojn dum la lastaj jarcentoj, kaj ties lingvo kaj kulturo atingis la 21-an jarcenton. Dum la lastaj jaroj, pro la turismo, ili plifortigis kaj adaptis iujn morojn, muzikojn kaj dancojn. Sed la polinezia lingvo de la insulo, la rapanuia, ekdisfalas pro tranĉo de la intergeneracia transdono. Konsciante, ke io ajn ne taŭgas por ŝanĝi la situacion, oni starigis la *Hon’a Re’o Rapa Nui* (2), kolektive konstruitan lingvomergadan lernejon.

En la 19-a jarcento, ne restis pli ol 111 loĝantoj en la insulo (3). Iliaj posteuloj estas la ĉirkaŭ kvarmil nunaj rapanuiaj loĝantoj de la insulo. La afiŝoj de la flughaveno salutas en ilia lingvo, kelkloke oni ĝin vidas en afiŝtabulo, kaj en ĝi estas la danckantoj por la turistoj. Sed la lingva transdono estas haltigita, kaj la damaĝo estas ega: «Kiam, en 1976, oni komencis la unuajn klasojn en la rapanuia, el kvar infanoj tri sciis la lingvon, en 2006, ili ne estis pli ol 10 %», laŭ *Viki Haoa*. Sian tutan vivon ŝi pasigis impulsante la rapanuian en la instruado, verkante lernolibrojn kaj rakontojn.

La strato *Te Pito O Te Hemua* iras de la haveno ĝis la preĝejo. Cent metrojn dekstre de la konstruaĵo ornamita per markonkoj kaj polineziaj bildoj, ĝi kondukas ĝis la domo de la *Hon’a Re’o*. Tiu ĉi estas



El Vikimedia.

Situo de la insulo Rapa Nui.

granda, bunta kaj larĝa. Interne ĝi ne havas murojn, por ke la infanoj estu kune, kaj nur je precizaj momentoj oni ilin disigas laŭ la aĝo en apartajn lokojn. «Ni komencis en 2017 kun 15 familioj, kiuj fidas je tiu ĉi instrumodelo. Nun ni havas 25 infanojn inter 2- kaj 4-jaraj», dirás *Estefania Araki*. La domo, la nesto, estas *tapu* (3), sakra loko: interne oni nur parolas rapanuie. Al la gepatroj oni petas la saman engaĝiĝon, «ekzemple, endome oni nomas *tapu* la kuirejon, tie oni

uzas nur la rapanuian, kaj do lernas la nomojn de la kuiriloj.»

Araki parolas pri la konsciigo de tiuj, kiuj ne heredis hejme la lingvon kaj poste lernis ĝin: «Estis granda neceso. Urĝas al ni. La hispana estiĝis mastro kaj sinjoro en la insulo. Tamen, se mi ekparolas rapanuie, multaj aktiviĝas. Ankaŭ estas afero de kutimo.» Eĉ se la maljunuloj pli obstine rezistis, la konscio pri la lingvo estas en la junuloj: «Tiuj, kiuj sciante la lingvon ne instruis ĝin al la gefiloj, ankaŭ ne parolas ĝin kun la genepoj. Kiam ni estis ĝin lernantaj, ili diris al ni: Kiam vi lernos la lingvon, mi parolos rapanuie kun vi.» Sed, «kiel mi ĝin lernos, se vi ne parolas ĝin kun mi?»

La fiasko de la dulingva modelo

Krom la lingvon, oni ankaŭ volas transdoni la kantojn, morojn kaj mondrigardon de Rapanuio, kaj la infanojn oni portas al la marbordo kaj al la legomĝardenoj. Ankaŭ al la gigantaj *Moai*-statuoj starigitaj de iliaj prapatroj por ekkoni ilin. Sed *Araki* bone scias, ke “la dulingva por-indiĝena instruado” estas riska: «La dulingvaj instruprogramoj starigitaj de la ĉilia ntruministerio fiaskis. Tiu ĉi lernejo estas la unua loko, kie oni vere revivigas la rapanuian. Fare de pedagogoj rapanuiparolantaj», asertis *Araki*. «Ni transdonas la saĝon, kosmogonion kaj kulturon de niaj prapatroj, sed estas la lingvo, kiu ligas ĉion ĉi. Oni devas tion fari rapanuie.» Kio laŭ eŭska vidpunkto tiom simple kompreniĝas, ofte ne tiel klaras en Latinameriko. Multaj indiĝenaj lernejoj instruas en la hispana.

En Rapanuio ni tenas rilatojn kun la mapuĉoj kaj aliaj popoloj de Ĉilio, sed ni rigardas ĉefe al Polinezio. «Ni kunlaboras kun maorioj kaj havajanoj. Ili ankaŭ suferis grandajn damaĝojn, sed ili vekiĝis; nun oni povas lerni maorie ĝis la universitato. Ni profitas tiun sperton preskaŭ 40-jaran.» La celo por la venontaj jaroj estas starigi elementan lernejon, «atingi la 6-7-jaran nivelon kaj, kompreneble, ni revas atingi la universitaton.»

Kiel helpantojn ili havas rapanuianon instruintan en *Aotearoa* (1) kaj maorian fakulon. Kiel diras insula proverbo «Rapanuio malproksimas, sed ne solas.» **UU**

Notoj:

(1) *Rapa Nui* (Granda Rapa). Paskinsulo.

Kontraŭ la opinio de la aŭtoro, kiu volus forpreni la -i-, ni esperantigis *Rapa Nui* al la radiko “Rapanui-” por respekti la indiĝenan formon. (NdR)

(2) La lingvonesto en la rapanuia.

(3) Laŭ *Alfred Metraux*, svisa antropologo, la unua popolo de la insulo, la *matamua* aŭ *haumaka* popolo, malkreskintus de 2500 ĝis 111 en 1877 pro deportado fare de peruaj sklavigistoj inter 1859 kaj 1863 kaj plu malkreskis inter 1860 kaj 1870 pro malsanoj. Posta enmigrado de agrikulturaj laboristoj el aliaj aŭstralaj insuloj en la rapanuian insulon rekreskigis la nombrojn de la loĝantoj, kiuj tiam prenis la nomon de la insulo *Rapa Nui*. El franclingva artikolo de Vikipedio. (NdR)

(4) La vorto “tabuo” havas la saman polinezian devenon.

(5) Nov-Zelando en la maoria lingvo.

Originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* (27.09.2019). Tr. *N. Xil Carvalho*, oktobro 2019-a.



«Ni severe trudis paroli nur rapanuie»

Virginia Haoa, estas instruisto, pasia defendanto kaj aganto por la rapanuia, kaj ŝi startigis projekton bazitan sur la lingvomergado por pluvivigi ĝin.



Virginia Haoa antaŭ la rapanuia lernejo.

Virginia Haoa estas elstara figuro en la revivigo de la rapanuia. Ŝian tutan vivon ŝi pasigis en la lukto por la lingvo, kaj fine oni atingis rapanuian lernejon. Ŝi memoras, ke dum ŝia infaneco en la lernejo oni punis tiujn, kiuj ne parolis hispane, “sed multaj sciis nur la rapanuian”. Nun, la infanoj, kiuj ne konas la lingvon, ĝin lernas, por ke tiu ĉi ne perdiĝu. Ŝi ne rezignaciis, eĉ ne kiam la antaŭa lernejo perdis la subtenon. Ŝi daŭre publikigis tekstojn, verkis rakontojn kaj senĉese laboris.



Specimeno de la antikva rapanuia skribmaniero.

Urtzi Urrutioetxea: La lernejo jam estas dujara. Kiel naskiĝis la projekto?

Mi emeritiĝis. Amikaro zorganta pri la rapanuia lingvo kuniĝis, kaj tiel ni ekis, kune kun la gepatroj, tiun ĉi gigantan ŝipon. Ni laboras kun la infanoj, sed la gepatroj estas nepraj. Multaj infanoj komprenis la rapanuian, sed oni devis eltiri la lingvon el ili, kaj por tio ni devis severe trudi: en la klaso oni nur parolas rapanuie, finite. Mi ne estas lingvisto, mi estas instruisto, sed ne fakulo pri edukado. Temis pri intuicio, virina intuicio, patrino intuicio, kiu diras al vi, kiel devas esti la aferoj.

Antaŭ tiu ĉi, ĉu vi havis alian sperton?

En la 1990-a jardeko, kun la urbestro mi iris al renkontiĝo de indiĝenaj popoloj, kaj mi enportis la sperton de *Aotearoa* (1). En la jaro 2000 ni montris, ke la infanoj lernas la lingvon, se vi estas kohera kun tio, kion vi diras. La infanoj sciis, ke en la klasĉambro la instruisto nur konas la rapanuian. Tiu projekto daŭris ok jarojn. Ankoraŭ nun tiu projekto nomiĝas “interkultura dulingva lernejo”, sed ĝi ne funkcias.

Por vi estis klara, ke tie estas necesa la lingvomergado modelo kaj la partopreno de la gepatroj.

Kiam ni akceptas infanon, ni petas engaĝiĝon de la familio. Ĝis nun ni petis, ke almenaŭ unu el la gepatroj sciu la lingvon, por ke la lingvo ĉeestu ankaŭ en la hejmo. Nun, ni mildigis la petojn, sed al tiu, kiu ne scias la lingvon, ni petas sin devontigi en lernado de la lingvo. En plejmulto de la familioj nur unu el la gepatroj estas rapanuiparolanto, kaj la alia hispanparolanto. Ankaŭ en la institucioj la hispana ĉefas; la premo egas, kaj ni sentas, ke la lingvo estas sufokata. La homoj pli aĝaj ol 40-45 jarojn ankoraŭ uzas ĝin, sed la malpli aĝaj eble komprenas ĝin, sed ne uzas. Pro tio la infanoj ne scias ĝin. Plejmulto faras miksaĵon: kiam ili parolas la hispanan, ili enmetas rapanuajn vortojn.

Vi ĵus komencis. Kiel vi vidas *Hona'a Re'o Rapa Nui* (2) post dek jaroj?

Mi esperas, ke estos pli da parolantaj infanoj. Infanoj, kiuj niajn lingvon, scion kaj valorojn kunportos. Kiuj sin mem, la aliajn, siajn prapatrojn kaj la naturon respektos. Mi ĵus estis en *Hawai'i* (3); tie oni atingis 20 000 parolantojn, kaj tio donas forton vidi, ke ni ne estas solaj, ke multaj aliaj popoloj estas en la sama lukto. Per iliaj ideoj la vojo faciligas. Hej! Ni kundividu spertojn kun la eŭskoj! **UU**

Notoj:

- (1) Nov-Zelando en la maoria lingvo.
- (2) En la rapanuia La Lingvonesto de la rapanuia.
- (3) En la havaĵa *Havaĵo*.

Originale aperis en la eŭska ĵurnalo *Berria* la 27-an de Septembro 2019-a. Tradukis: *Nikolas Xil Carvalho*. Oktobro 2019-a



Emblemo de Rapanuio laŭ ties arta tradicio.

ERRATUM

En la numero 103, p. 19: sub la titolo estis erare sikribita parenteze, post *Gastejso*, *Gasteix* anstataŭ *Gasteiz*. Ni pardonpetas pro la eraro. NdR